



Moliero / Zamenhof. Georgo Dandin

# Jean-Baptiste Molière

## Georgo Dandin

Kritika bitlibra eldono de la komedio de Moliero en la traduko de Zamenhofo, unue publikigita en la jaroj 1907<sup>a</sup>–1908<sup>a</sup>.

«Georgo Dandin» estas 3-akta komedio de Moliero, verkita en la jaro 1668<sup>a</sup>.

La protagonisto Georgo Dandin /dandèn/ estas tipo de naivulo (riĉa kamparano edziĝinta al nobelino), suferanta pro tio, ke lia malprudenta deziro plenumiĝis.

Lia frazo «Vi ĝin volis, vi ĝin volis, Georgo Dandin vi ĝin volis!» (akto 1<sup>a</sup>, la lasta sceno) proverbiĝis en la franca kaj kelkaj aliaj lingvoj.

**Moliero**

**Georgo Dandin**  
**aŭ**

**La konfuzita edzo**

**Komedio en tri aktoj**

**El la franca tradukis L. L.**  
**Zamenhof**

# Antaŭparolo de la editoro

## La verko

### En la literaturo franca

«Georgo Dandin» ne apartenas al la pintaj verkoj de Moliero, kvankam unu ĝian frazon:

Vi ĝin volis, Georgo Dandin, vi ĝin volis!

konas multaj homoj, eĉ tiuj, kiuj neniam legis aŭ spektis la komedion.

«Georgo Dandin» ne estas tiom amuza, kiel la pli ŝataj komedioj de Moliero. Onidire, la verko estus pli spektinda prezentate kun la baledo de *Lully*, kiel intencis la kunaŭtoroj. Pri tio juĝi mi ne povas.

Ankaŭ morale la verko estas dubinda. Diris Ĵ.-Ĵ. Rusoo en sia publika «Letero a Dalamberto»<sup>1</sup>:

... Kiu estas pli kulpa, ĉu vilaĝano malsaĝe edziĝinta al nobelidino, aŭ edzino kiu volas senhonorigi sian edzon? Kion oni pensu pri teatraĵo, kiu igas la parteron aplaŭdi ŝiajn malfidelon, mensogon, senhontecon, kaj moki la stultecon de la punata vilaĝanaĉo?

Tamen maleblas negi, ke Georgo Dandin simple aĉetis

---

<sup>1</sup> Jean-Jacques Rousseau: *Lettre à M. d'Alembert sur les spectacles*. (1758)

sian edzinon kiel varon. La sentimentala aŭtoro de «La nova Heloizo» kaj liaj samtempoj tion ignoris, sed la pli delikata Moliero tion komprenis, kaj lasas la rolulojn tion klare diri:

**Georgo Dandin** (*al s-ino de Sotenville*) (...) La historio estis ne malbona por vi, ĉar sen mi viaj aferoj — volu min pardoni — estis tre kadukaj, kaj mia mono servis por ŝtopi tre rimarkeblajn truojn... (1:4)

(...)  
**Angeliko** (*al Georgo Dandin*) (...) Ĉu antaŭ la edziĝo vi demandis pri mia konsento kaj ĉu mi vin volas? Vi demandis pri tio nur mian patron kaj mian patrinon; en efektiveco ja nur ili [ge]edziĝis kun vi... (2:4)

Tia familia konflikto povus egale bone estiĝi ĉe geedziĝa aĉeto inter egaluloj; do, malgraŭ la kutima interpreto, ne la malegaleco orduma<sup>2</sup> estas la risorto de la intrigo, kvankam ĝi jes estas la fonto de la elementoj komikaj. Kaj laŭ mi la gesinjoroj Sotenville estas pli ridindaj gestultuloj ol Georgo Dandin.

Iuj modernaj reĝisoroj provas surscenigi tiun teatraĵon kiel Ĉeĥovan dramon. Eble tio ĝin refreŝigas, kvankam malprobablas, ke la samtempuloj de Moliero aŭ Zamenhofo rigardis ĝin tiel.

---

<sup>2</sup> **ord·um·o** — En antikva aŭ feŭdisma socio, aparta socia grupo, kun heredaj aŭ korporaciaj leĝe fiksitaj devoj kaj rajtoj (interalie, la nobeloj, la burĝoj, la servutuloj).

## En Esperanto

Kial do tiu elekto de tradukota verko flanke de Zamenhofo (aŭ de tiuj, kiuj instigis lin traduki)? Probable pro la mallongeco. Teatraĵo mallonga, sed ja moliera.

Oni miras antaŭ la nombro [*de la zamenhofaj*] tradukoj aperintaj en la jaroj 1907–08: verŝajne kelkaj el ili estis jam pretaj de antaŭe kaj atendis nur eldoneblecon. Sed tamen lia rapideco estas eksterordinara: se oni memoras, ke li povis labori nur en la vespero, post longa laciga labortago (...) Cetere tiu rapideco ne estis sen malutilo: liaj tradukoj suferas precipe pro du difektoj: unue, ili estas ne tre ĝustaj, en kelkaj lokoj eĉ ne mankas kontraŭsencoj (...); due, ili ne ĉiam estas ŝirmitaj kontraŭ invado de nacilingvaj idiotismoj (tio estas precipe konstatebla en la traduko de *Georgo Dandin*).

G. Waringhien<sup>3</sup>

Efektive, en tiuj du jaroj (1907–1908) aperis:

- «La revizoro», 1907.
- «La predikanto» (el Biblio), 1907.
- «Georgo Dandin», 1907–1908.
- «Ifigenio en Taŭrido», 1908.
- «La rabistoj», 1908.
- «Marta», 1908–1909.
- «La psalmaro» (el Biblio), 1908.

---

<sup>3</sup> *Enciklopedio de Esperanto*, la artikolo «Zamenhof L.L.: Verkaro».

## La fontoj

La zamenhofa dispartigo de la teksto en scenojn estas alia ol tiu, kiun mi vidas en modernaj francaj eldonoj.

Laŭ la PIV-oj, **sceno** estas

Divido de akto, dum kiu la agado estas kontinua, aŭ (speciale en la franca teatro) ne okazas eniro aŭ eliro de roluloj.

Nun la francoj plejparte sekvas la devivan eldonon<sup>4</sup>, en kiu «sceno» estas unuo de agado, tiel ke en unu sceno la nombro kaj la konsisto de la roluloj povas vari. Ĉe Zamenhofo (kaj en la tradukoj rusaj) disdivido en scenojn estas pli detala, ĉiu apero aŭ foriro estas markita kiel scena ŝanĝo. Ĉe la *Guglaj Libroj* estas skanaĵo de la komedio eldonita de la franca teatro en Berlino, kun ekzakte tiaj dispartigo kaj rimarkoj, kiel ĉe Zamenhofo:

George Dandin, ou Le mari confondu: comédie en trois actes.  
N<sup>o</sup>276 de Répertoire du théâtre français à Berlin, 1843. — 37 pages.

Mi laŭe aranĝis la franclingvan tekston kaj konvertis

---

<sup>4</sup> La eldonon aperintan dum la vivo de Moliere. PIV donas la kompletan adjektivon «postmorta», sed mankas io responda al la rusa «прижизненный» (france «*publié de son vivant*»). Mi paŭsas tion per *deviva*, ĉar la memtrudiĝanta *dumviva* jam akiris alian signifon («daŭranta dum la tuta vivo», ruse «пожизненный»). La editoroj de klasikaĵo kutime preferas ties «lastan devivan eldonon».

ĝin en bitlibron fikŝenbukan.

La esperantan tekston mi ekstraktis el la PDF-libro de Franko Luin. Mi korektis kelkdek erarojn de skanado aŭ presado, ekz-e KIAŭdino/Klaudino (Klaŭdino), ma (mia), prop(r)avole, at (al), fianko (flanko), jus (ĵus) ktp. Krome, plurajn dubindajn lokojn mi korektis laŭ unua eldono en «La Revuo», kies skanaĵojn rete disponigas la Aŭstria nacia biblioteko: Akto unua (n-ro 23); Akto dua (n-ro 24); Akto tria (n-ro 25). Mi kontrolis ne la tutan tekston, sed nur la suspektindajn lokojn de la INKO-teksto.

## La lingvaĵo

### Numeraloj

La teksto prezentas strangajn deviojn de la Fundamento, hezitojn kiaj en verko eldonita en la jaro 1908<sup>a</sup> ne devus aperi. Ekzemple pri la numeraloj el la intervalo 11 ... 19.

La teksto en «La Revuo» traktas vicmontrajn numeralojn en maniero kiu estas nek fundamenta nek kohera («Sceno dek-unua» en la akto 2<sup>a</sup>, n-ro 24; «Sceno deku-nua» en la akto 3<sup>a</sup>, n-ro 25). Mi unuecigis laŭ la stilo de §12 de la Fundamenta Ekzercaro (la **dudek duan** de Februaro de la jaro **mil sepcent tridek dua**): «Sceno dek unua» (ekzakte kiel en la lingvo uzbeka).



## Misuzoj de la pronomo «ĝi»

La plej ĝena (pro sia ofteco) trajto de la zamenhofa teksto estas la troa kaj misa uzo de «ĝi». Neniu el la 28 aperoj de *ĝi(n)* en la *Fundamenta Ekzercaro* (ĉi-sube referencata per «FE») prezentas tian eraron.

Jen kion diras PMEG pri «„Tio“ kaj „ĝi“»:

Iafoje oni povas heziti inter *tio* kaj *ĝi*. Normale oni uzas *tio* pri io nedifinita, kion oni ne povas aŭ volas nomi per preciza O-vorto. Nepre oni uzu *tio* por reprezenti ion, kio estis esprimita per tuta frazo. Oni uzas *ĝi* por io difinita, kiun oni antaŭe esprimis per O-vorto, kaj kion oni povus ripeti per la sama O-vorto kun *la* aŭ alia difinilo (...) Zamenhof iafoje uzis *ĝi*, kiam oni nuntempe preferas *tio*.

Ĉi-rilate Zamenhofo sekvas la lingvojn ĝermanajn (la germanan kaj la anglan), kiuj ofte uzas tiel la respondajn neŭtrajn pronomojn triapersonajn *es* kaj respektive *it*. En la lingvoj franca, rusa kaj pola tiun funkcion plenumas montraj pronomoj respondaj al *tio* aŭ *ĉi tio* (ce, это, to). La *Fundamenta Ekzercaro* sekvas la *tio*-sistemon; kaj — laŭ mi, PAG, PMEG — tiu lasta estas la normo por la moderna Esperanto. Ekzemple:

Z: *Ĝi* estas ili. Ts! (3:2)

fr: *Ce* sont elles. St.

de: Sie sind *es*. — Pst!

ru: *Это* они! Тсс!

en: 'Tis they. St.

Z: se *ĝi* estus kampulino (1:3)  
 fr: si c'était une paysanne

Kp «**tio ĉi** estis tiu sama feino» (FE §19).

Kial Zamenhofo misuzis «*ĝi*»n, malgraŭ la originalo kaj la Fundamento? En kelkaj okazoj oni povus supozi, ke li faris tion por stila efekto, ĉar tia *ĝi* «donas iom trivialan tonon al la stilo» [PAG, §47, p.75]; tamen tio neniel respondas al la tono de la originalo (interalie, la unue cititan replikon diras la nobela amanto Klitandro). Enigmo.

PMEG plue konstatas:

Zamenhof iafoje uzis *ĝi* kiel superfluan duoblaĵon de subjekto aŭ objekto, kiam la vera subjekto aŭ objekto estis I-verbo aŭ subfrazo. Li ankaŭ uzis iafoje *ĝi* kiel superfluan duoblaĵon de subjekto de *esti*, kiam la vera subjekto staris post *esti*. Tiu uzo komplete malaperis, kaj estas nuntempe rigardata kiel eraro (...)

Ekz-e (1:2):

Z: ŝi akiris mian amon, kaj *ĝi* nur dependos de ŝi, ke ni fariĝu geedzoj.  
 fr: elle a gagné mon amitié, et **il** ne tiendra qu'à elle *que* nous ne soyons mariés ensemble.

La subpropozicio estas la subjekto; kaj la tuta propozicio estas pli klara, se *ĝi* aperas post la verbo. Estas nenia problemo meti *ĝin* tiel en Esperanto:

«... kaj de ŝi sola dependas, ke ni fariĝu geedzoj».

Kp en aliaj verkoj:

*Ŝajnas al mi, ke el ŝia buŝo elsaltas perloj kaj diamantoj!* (FE §17).

*Estus tre bele, (...) ke mi iru al la fonto!* (FE §19).

*El la dirita regulo sekvas, ke (...) ni povas ĉiam uzi la akuzativon* (FE §29).

*Sed matene montriĝis, ke tio estas Lea* (Genezo, 29:25).

Sed franclingve la rigida vortordo postulas, ke la subjekto antaŭu la predikaton; tial por kompromisi kun la indikita loko de la subpropozicio la francoj metas anoncan (kataforan) pronomon. Tia pronomo estas tute superflua en Esperanto, kaj ĝi malakordas kun la normala funkciado de *ĝi*, kiu (kiel prave konstatas PMEG en la unua citaĵo ĉi-supra) –

1. normale referencas ion menciitan pli frue (estas ne katafora, sed anafora);

2. referencas ne tutan frazon aŭ infinitivan grupon, sed ion substantive indikitan.

Jen ankoraŭ pli ŝoka frazo (3:8), en kiu *ĝi* referencas plurajn agojn ĵus menciitajn per tutaj frazoj (ne per substantivoj):

Z: Tamen *ĝi* estas ja agoj, kiujn vi devas pardoni al mia aĝo....

fr: Mais enfin *ce* sont des actions que vous devez pardonner à mon âge

de: Aber *das* sind doch schließlich Dinge, die du meinem Alter zugut halten mußt

en: But, after all, you should forgive *things* of this nature, on the score of my age

ru: Но ведь *всё это* прощительно в моём возрасте.

Ĉi tie temas pri pluro da aferoj kiuj ne formas unu situacion senprobleme referenceblan per *tio* (kaj ankoraŭ malpli per *ĝi*). La logika pronomo ĉi-okaze estus *tioj* (pli detale vd mian studaĵon «Diversaj ioj» en LODE, n-ro 81, 2001:07). En la moderna lingvo multaj esperantistoj tamen uzus «*tio*»n en ĉi tia frazo; malmultaj uzus la simplan, sed eŭroplingve nekutiman «*tioj*»n; lingve pli sentemaj personoj eble uzus elturniĝon similan al la traduko angla (...pardonu *tiajn aferojn*) aŭ rusa (ja *ĉio ĉi tio* estas pardonebla...).

Ĉiel ajn, pri siaj *ĝi*-misuzoj Zamenhofo ne estas konsekvenca. En unu sama sceno (2:1) tute apude aperas:

**Lubin.** ... Fi! kiel neĝentila *ĝi estas* tiel forpuŝi personojn!  
(...)

**Lubin.** ... Fi! *Estas* malbele esti tiel kruela!

Kp ankaŭ:

**Lubin.** Kiamaniere vi *tion* faras, ke vi estas tiel bela? (2:1)  
Ho, se mi povus *ĝin* atingi, ke li atestu al la gepatroj (2:7)  
*Ĝi estas* via feliĉo, ke mi vin bezonas (3:4)

Normale al tiaj francaj «*il*» respondas nulo:

«qu'il est très bon de ne s'y point frotter» = «ke estas tre bone lasi ĝin flanke» (1:1)

«Il ne faut pas qu'il sache rien de tout ceci» = «Estas necese, ke li nenion sciu pri tio» (1:2)

«Est-il possible, notre gendre, que vous...» = «Ĉu estas eble, nia bofilo, ke vi...» (1:4)

«il me semble que ...» = «ŝajnas al mi, ke ...» (1:4)

«que tout notre gendre que vous soyez, il y a grande différence de vous à nous» = «ke, kvankam vi estas nia bofilo, estas granda diferenco inter vi kaj ni» (1:4)

Sed jen samsenca admono, en kiu la originalo uzas *ce* (tio), kiun Zamenhofo tradukas per malnecesa *ĝi*:

«ne por vi ĝi estas konvena uzi tiun vorton» (1:4)

En Esperanto tio sonas galimatie. Zamenhofo paŭsas la strukturon de la franca frazo, kiu ĉi-okaze estas moŝtece malafabla; probable Zamenhofo volis esprimi tiun stilan nuancon, sed plene malsukcesis: la stumbligo neniel esprimas la celatan nuancon, kaj aliflanke, la franca frazo por franclingvano estas tute flua:

«ce n'est pas à vous à vous servir de ce mot-là».

## Leksikaj devioj

Zamenhofo nemalofte lasas sin trompi per la ekstera internacieco de francaj vortoj. Ekz-e li meĥanike tradukas *honnête* per *honest*, kvankam la moliera vorto plej ofte signifas, proksimume, «konvena al nobelo» – ekz-e Kli-

tandro estas «la plej ~~honest~~ homo», ĉar li *malavare* pagas («li donis al mi tri orajn monerojn»). Por (ekz-e) ruslingvano tio aspektas kiel satiro pri koruptaj moroj, efekto kiun Moliere ne celis.

Kelkloke Zamenhofo ial germanece misuzas *se* anstataŭ *kiam* (responde al la franca *quand*).

Krom la nefundamenta misskribo de la numeraloj 2-foje aperas ~~gebopatroj~~ (3:4), anstataŭ la fundamenta *bogepatroj* («Ekzercaro» §39); cetere, ankaŭ «bogepatroj» aperas dufoje.

## Tradukarta kritiko

### La arta sistemo de la verko

En kiu estetiko oni traduku — ĉu en tiu de la moliera epoko, aŭ en la estetiko moderna?

La moderna estetiko estas: pedante konservi la malvivan literon. Ankaŭ tute senmetafore: skribi *in* (en *Dandin*, *Colin*) laŭ la franca ortografio, kaj preskribi la kontraŭskriban voĉlegon *-én*.

«Tradukoj estas kiel edzinoj: la belaj malofte estas fidelaj, la fidelaj malofte estas belaj.» La traduko Zamenhofs trebas esti fidela (ekstere). Tial la esperanta versio estas ankoraŭ pli teda ol la moliera originalo.

Ne tia estis la komedia estetiko en la epoko moliera. Ĝi

pli similis delarton<sup>5</sup>. La migraj aktoroj adaptadis siajn farsojn al la okazo, interalie al la realaĵoj kaj lingvo de la publiko.

Certagrade ankaŭ «Georgo Dandin» estas versaĵla versio de la farso «La Jalousie du Barbouillé» (verdire, pli ol delarta adaptaĵo, ĝi estas iom pli funde prilaborita).

La tradukistoj malnovaj bone komprenis tiun koncepton, kaj en siaj tradukoj adaptis la komedion al sia nacia medio. Tio evidentas jam el la titoloj: la germana «Von dem armen Jurgen», la pola «Grzegorz Fafuła». Unu el la adapteblaj elementoj evidente estas la propraj nomoj.

## Propraj nomoj

En la moliera teatro estas pluraj klasoj da nomoj propraj.

**Unue**, estas preciozaj nomoj kvazaŭklasikaj, kia en ĉi tiu komedio estas *Klitandro* (Clitandre). Malpli evidentas ke ankaŭ *Angeliko* (Angélique) estas unu el la nomoj samtradicie rezervitaj por la rolo de la ĉefamatinino. Tiaj nomoj facile esperantiĝas; ili komunikas al la verko karakteron eksterlokajn, idealajn, parencajn al la ideo pri Esperantujo. Tiaj nomoj funkcias simile al la maskonomoj delartaj; kaj ne maleblas ke *Klaŭdino* estas franca respondaĵo por la simila *Kolombino*, la delarta masko de vigla ĉambristino.

---

<sup>5</sup> **Delarto** — Esperantigo de la itala termino *commedia dell'arte*.

**Due**, estas karakterizaj nomoj<sup>6</sup> pli rekte, perlingve priskribaj. En la koncerna verko tiaj estas *Dandin*, *Sotenville*, *Prudoterie*. Tiuj nomoj estas banalaj, hejmaj kaj memkompreneblaj *por la publiko fontolingva*; kaj inverse, tiuj nomoj estas ekzotaj kaj sensencaj por la publiko internacia.

**Trie**, estas nomoj lokaj kaj sensignifaj, kiaj *Colin* kaj *Lubin*. Simile al la nomoj de la unua klaso, ili ne prezentas klaran semantikon; simile al la nomoj de la dua klaso, *por la publiko fontolingva* ili klare indikas la socian pozicion de la rolulo laŭ la loka tradicio.

## Georgo Dandin

Zamenhofo tradukis la antaŭnomon (George /ʝorʝ/ → Georgo), kaj lasis fremdlingva la familinomon Dandin, kun la indiko ke oni voĉlegu tiun fremdaĵon /dandèn/. Ambaŭ decidoj estas malbonaj.

La per traduko grekigita «Georgo» aspektas kiel nomo de la unua klaso (kiel *Klitandro*). Eble Moliero ja intence elektis antaŭnomon kiu greke signifas «terkulturisto»; tamen por ordinara spektanto franca George [ʝorʝ] estas tro ordinara nomo, por ke oni pensu pri tio (tiom malpli, ke

---

<sup>6</sup> **Karakteriza nomo** estas nomo de fikcia persono, karakterizanta ties personan trajton, karakteron aŭ rolon en la verko. Ruse *говорящее имя*, germane *sprechender Name*, pole *nazwisko znaczące*, angle *charactonym*.



*George Le Veau*, «Ĵorĵo la Bovido», estas tradicia kampulo de la franca farso). Tial la germana tradukisto preferis pli kampulan formon *Jurgen*, kaj la polaj tradukistoj elektis *Grzegorz*, kiu verdire respondas al *Gregorio*, tamen pollingve sonas /gĝegoĵ/, tre simile al la franca /ĵorĵ/, kaj samtempe estas versimila nomo kampula.

Eĉ pli malbona ol la antaŭnomo, ankoraŭ pli malkonvena estas la formo *Danden'*, tre maltrafe pensiganta pri la fundamenta *dando*. *Dandin* en Esperanto estas do tiom malkonvena, ke preskaŭ taŭga — kiel antifrazo. Aliflanke, tia antifrazo malkonvenas al la pedanta skolo (kiun ĝenerale laŭas la zamenhofa traduko), ĉar ĝi enkondukas elementon kiun la franca nomo malhavas.

Laŭ tiuepoka vortaro (Jean Nicot, 1606), «dandin» estas «stulta gapulo»:

DANDIN est dit de celui qui baye çà et là par sottise et badaudise, sans avoir contenance arrêtée: *ineptus insipidus*; et DANDINER, user de telle badaudise, *ineptire*.

Rablezo (F. Rabelais) uzis samsonan familinomon en *Gargantuo*, 3:41 (*l'appointeur de procès Perrin Dandin*; en la rusa traduko fare de Н. Любимов tre amuze: «Перен Бальбес»). Poste la nomo aperas ĉe Rasino (J. Racine, «Les Plaideurs») kaj Lafonteno («L'huître et les plaideurs»).

La pola «Grzegorz **Fafuła**» proksimume esprimas tiun ideon pri plumpulo, mallertulo, dupo. Tamen por la modernaj francoj probable pli aktualas la ideo pri balanciĝo, pendolado — kaj metafore, hezito (kp *se dandiner* = anaspaŝi). Tial la moderna traduko pola estas «Grzegorz Dyndała» (de la verbo *dyndać* — senvole aŭ sencele balanci, piedbalanci, svingadi, pendolaĉi). La tuto sonas tre nature, konvenas laŭsence, kaj sonas proksime al la franca originalo.

Plue, la «promocio» *Dandin* → *sinjoro de la Dandinière*, por esperantisto nekomprenebla, en la pola trovas klaran (por pollingvano) tradukon *Fafuła* → *pan Fafułowicz* (mi koncedas, ke en Esperanto mankas tradicio kiu ebligus tian tradukon).

## La dua klaso

Ĉi tiuj karakterizaj nomoj estas sensencaj en Esperanto.

**Sotenville** — France «*sot en ville*» signifas «stultulo en urbo»; do, proksimume «Stultenburgo» (en polaj tradukoj «baron Gapiomiejski»).

*Jacqueline de la Prudoterie* (1:4) — Nun en Esperanto ekzistas parenca vorto simila (*pruda, prudeco* — vorto kiun Zamenhofo akceptis en la vortaroj esperanta-germana kaj esperanta-rusa, sed kiu plu restas neoficiala). Do, certagrade la franca signifo estas divenebla, malgraŭ la

longa vostonparto, en Esperanto sensenca. Kp la polan «*Skromnicka*».

Aparta barbaraĵo estas la uzo de la francaj vortetoj «*de (la)*» por marki nobelecon. Tio ne estas ia universalajaĵo, tio estas loka trajto de la franca nomsistemo, tiom pli ĝena, ke «*de*» kaj «*la*» aspektas kiel vortoj de Esperanto. La pola traduko «*barono Gapiomiejski*» estas pli konvena maniero esprimi la koncernan signifon; dum «*de la Dandinière*» estas simetria al la voltera moko «*le baron de Thunder-ten-tronckh*» el «*Kandido*». Cetere, kp la germanajn *Otto von Bismarck*, *Johann Wolfgang von Goethe* — ial la germanoj ne estas tiom vantaj pri sia *von*, kiu malaperas ĉe esperantigo (kp cetere *Lafonteno* ← *Jean de La Fontaine*).

## La tria klaso

Socie *Colin* kaj *Lubin* apartenas al la sama ordumo, kiel *Georgo Dandin* kaj *Klaŭdino*; sed ial Zamenhofo traktas tiujn nomojn alie. Eble ĉar li ne konas ilian etimologion.

*Colin* (aŭ *Collin*) estas vira antaŭnomo, devenanta el *Nicolas* (t.e. «*Nikolao*»). En simila situacio fabela Zamenhofo tre konvene esperantigis similan variaĵon dana-germanan per *Niko*: «*Malgranda Niko kaj granda Niko*» (dane «*Lille Claus og store Claus*»).

La franca *Lubin* estas nomo kanona (*Saint Lubin*, latine

*Leobinus*, la nomfesto je la 14 de marto). Tamen la nomo probable ne estas vaste konata, kaj ĉe Moliero ĝi ŝajnas aparteni al la same popola stila tavolo, kiel *Colin*.

En Esperanto ĉi tia stila efekto ne funkcias. Iom pli internacia esprimilo povus esti uzo de diminutivo por la servistoj, kiel en la pola, kie *Klaŭdino* iĝis *Kasia* (esperante povus esti *Klanjo*). Kp la anglan *Sam* (plene *Samuelo*, la lakeo de s-ro Pikviko); france la ĵus menciita *Colin* aŭ *Pierrot* (Pieroto, t.e. «Peĉjo», lakea masko delarta).

### «Poetoj detruas la lingvon»

Literaturaj efektoj ofte funkcias per perforto al la lingvo. Tiaj perfortoj estas danĝeraj por Esperanto, kaj precipe danĝeraj ili estis en la frua periodo.

Ekz-e Angeliko diras «provu iom, por plezuro, sendi al mi sendatojn» (1:6), dum en la originalo staras «sendi al mi *ambasadojn*». Zamenhofo neŭtralis la preciozan burleskaĵon, eble ĉar ĉe la ankoraŭ malfirma stato de la esperanta leksiko iuj legantoj povus miskonkludi, ke «ambasado» estas konvena vorto ĉi tie. Cetere, ekster la franca literatura procezo de la 17<sup>a</sup> jc tia misuzo ne plu amuzas: modernulo ne konas la parodiatan fenomenon, kaj tial ne perceptas la parodiecon. Tial ankaŭ en la lingvoj kun tute firma literatura tradicio oni egale neŭtraligas ĉi tiun ne plu amuzan ŝercon.

## Scenejo kaj komentario

Ne nur la literaturprocezoj, sed ankaŭ la socipolitikaj aludoj de la moliera komedio estas plejparte ne plu kompreneblaj por modernulo aŭ alilandano. Amuzan ekzemplon prezentas ĉi-rilate la pola traduko, kiun mi tiom laŭdis ĉi-supre:

S-ro de Sotenville fanfaronas pri sia partopreno en «*l'arrière-ban de Nancy*» kaj «*le grand siège de Montauban*» (1:5). La pola tradukisto anstataŭigis tiujn nekonatajn eventojn per aliaj, pli famaj, vere gloraj kaj konataj al la pola publiko. Li evidente ne komprenis la ironion de Moliero: li kredis, ke «la granda sieĝo de *Montauban*» estis io vere grava. Tio certgrade nobligas baronon Gapiomiejski, kiu iĝas ja meritulo, eĉ se iom stulteta. Probable multaj legantoj de la zamenhofa traduko same komprenus tiun lokon.

En kritika eldono filologia tiajn aludojn eblas kaj endas klarigi per komento; sed komento ne funkcias en spektaklo teatra. Kio estis amuza en Versajlo antaŭ 350 jaroj, hodiaŭ estas malklara tedaĵo. La verko (almenaŭ en la formo de la traduko zamenhofa) prezentas intereson por legado, ne por efektiva surscenigo<sup>7</sup>.

---

<sup>7</sup> Laŭ la Vikipedio, prezento de «Georgo Dandin» fare de katalunaj aktoroj estis planita por la Deko Universala Kongreso en Parizo (1914), sed supozeble ne okazis pro la milito.

Ŝajnas ke Zamenhofo mem perceptis sian tradukon kiel tekston skriban, ne kiel dramverkon sonantan. Kiam li transskribas la antaŭnomon *Jacqueline* per *Jakelino*, li transskribas por la okulo (kvankam nenio malebligas transskribi por la orelo: *Ĵaklino*).

Malprobablas ke baldaŭ (aŭ entute) ni havos arte valoran tradukon de ĉi tiu komedio: ankoraŭ restas netradukitaj multaj multe pli ĝuindaj verkoj de Moliero. Ĉi tiu zamenhofa traduko prezentas intereson precipe esperantologian — estkiel enigmo, kial 2 jarojn post la oficialigo de la Fundamento li publikigas verkon lingve tiom malsuperan ol la Fundamento?

*Sergio Pokrovskij*

# Personoj

**Georgo Dandin** (Dandèn)<sup>8</sup>, riĉa kampulo, edzo de Angeliko.

**Angeliko**, edzino de Georgo Dandin kaj filino de s-ro de Sotenville.

**S-ro de Sotenville** (Sotanvìl)<sup>9</sup>, kampara nobelo, patro de Angeliko.

**S-ino de Sotenville**.

**Klitandro**, amanto de Angeliko.

**Klaŭdino**, servantino de Angeliko.

**Lubin** (Lübèn), kampulo, servanto de Klitandro.

**Colin** (Kolèn), servisto de Georgo Dandin.

*La loko de agado estas antaŭ la domo de Georgo Dandin en la kamparo.*

---

<sup>8</sup> *Dandin* france indikas homon mallertan, plumpan, stultetan (vidu en la «Antaŭparolo»).

<sup>9</sup> *Sotenville* — France *sot en ville* signifas «stultulo en urbo»; do, proksimume «Stultenburgo» (vidu en la «Antaŭparolo»).

# Akto unua

## Sceno unua

**Georgo Dandin**, *sola*. — Ha, nobela edzino estas malbona afero! kaj mia edziĝo estas instrua leciono por ĉiuj kampuloj, kiuj volas leviĝi super sian staton kaj edzoliĝi kun domo de nobelo, kiel mi faris! La nobeleco per si mem estas bona; ĝi estas io valora, tute certe; sed ĝi estas ligita kun tiom da malbonaj cirkonstancoj, ke estas tre bone lasi ĝin flanke. Pri tio mi farigis saĝa per mia propra kostopago, kaj mi scias, kiel nin traktas la nobeloj, kiam ili nin nenobelojn akceptas en sian familion. La ligiĝo, kiun ili faras, estas tre malgranda rilate nian personon; sole kun nia haveco ili edziĝas; kaj kiel ajn riĉa mi estas, mi farus pli bone, se mi edziĝus kun senartifika kaj bona kampulino, anstataŭ preni edzinon, kiu tenas sin pli alte ol mi, vidas ofendon por si en tio, ke ŝi portas mian nomon, kaj pensas, ke per mia tuta riĉeco mi ne sufiĉe pagis por la honoro esti ŝia edzo. Georgo Dandin, Georgo Dandin! vi faris malsaĝaĵon, la plej grandan en la mondo. Mia domo estas nun por mi io terura, kaj ĉiufoje, kiam mi eniras en ĝin mi nepre trovas tie ian ĉagrenon.



## Sceno dua

*Georgo Dandin, Lubin.*

**Georgo Dandin** *al si mem, vidante, ke Lubin eliras el la domo.* Kion, al la diablo, tiu sentaŭgulo faris ĉe mi?

**Lubin** *al si mem, rimarkante Georgon Dandin.* Jen ia homo min observas!

**Georgo Dandin** *al si mem.* — Li min ne konas.

**Lubin** *al si mem.* — Li ion suspektas.

**Georgo Dandin** *al si mem.* — Ha, li forte sin ĝenas saluti.

**Lubin** *al si mem.* — Mi timas, ke li ne rakontu al iu, ke li vidis min elirantan<sup>10</sup> el tie.

**Georgo Dandin.** — Bonan tagon!

**Lubin.** — Via servanto!

**Georgo Dandin.** — Vi ne estas de ĉi tie, al mi ŝajnas?

**Lubin.** — Ne, mi venis ĉi tien nur por vidi la morgaŭan feston.

---

<sup>10</sup> *vidis min elirantan* — En la moderna Esperanto oni diras «vidis min eliranta» aŭ (pli bone) «vidis min eliri». PAG (1985) atentigas (§172):

«Kun tiaj predikativoj, la uzado estis longatempe ŝanceliĝema, kaj en la primitiva literaturo trovos multajn ekzemplojn de predikativaj participoj en akuzativo; tio estas severe evitinda.» — Kp la ĝustan «mi lin trovus kuŝanta» ĉi-sube, en 1:7.

**Georgo Dandin.** — Efektive? diru, mi petas, vi venas de tie el la domo?

**Lubin.** — Ts!

**Georgo Dandin.** — Kio?

**Lubin.** — Silentu!

**Georgo Dandin.** — Kio do estas?

**Lubin.** — Ho, nu! Vi ne devas diri, ke vi vidis min elirantan el tie.

**Georgo Dandin.** — Kial?

**Lubin.** — Mia Dio! ĉar ...

**Georgo Dandin.** — Kial do?

**Lubin.** — Mallaŭte! mi timas, ke oni nin aŭskultas.

**Georgo Dandin.** — Tute ne, tute ne!

**Lubin.** — Mi ĵus parolis kun la mastrino de la loĝejo, en komisio de unu sinjoro, kiu faras al ŝi amajn okuletojn; kaj estas necese, ke oni tion ne sciu. Vi komprenas?

**Georgo Dandin.** — Jes.

**Lubin.** — Tio estas la kaŭzo. Oni severe ordonis al mi, ke mi min gardu, ke neniu min vidu; tial mi petas vin, ne diru, ke vi min vidis.

**Georgo Dandin.** — Mi min gardos.

**Lubin.** — Mi tre volas fari la aferojn sekrete, kiel oni rekomendis<sup>11</sup> al mi.

---

<sup>11</sup> kiel oni rekomendis — La francaj originaloj hezitas inter recom-

**Georgo Dandin.** — Tre prave.

**Lubin.** — La edzo, kiel oni diras, estas ĵaluzulo, kiu ne volas, ke oni ludu amon kun lia edzino, kaj li diable furiozus, se io simila venus al liaj oreloj. Vi komprenas?

**Georgo Dandin.** — Tre bone.

**Lubin.** — Estas necese, ke li nenion sciu pri tio.

**Georgo Dandin.** — Sendube.

**Lubin.** — Oni volas trompi lin tute silente. Vi komprenas?

**Georgo Dandin.** — Plej perfekte.

**Lubin.** — Se vi dirus, ke vi vidis min elirantaĵ el lia domo, vi malbonigus la tutan aferon. Vi komprenas?

**Georgo Dandin.** — Certe! Kaj kia estas la nomo de tiu, kiu vin sendis tien?

**Lubin.** — Ĝi estas la sinjoro de nia loko, sinjoro vicgrafo de ... Pesto! mi neniam memoras, kiel al la diablo, oni elparolaĉas tiun nomon; sinjoro Kli ... Klitandro<sup>12</sup>.

---

*mandé* (rekomendis) kaj *commandé* (ordonis). Ĉi-okaze pli ĝustas la dua.

12 Ĉi tie Lubin provas rememori du malsamajn nomojn: «sinjoro vicgrafo de io» (la «veran» nomon de Klitandro; france ne eblus *Monsieur le Vicomte de Clitandre*); tio cetere indikas, ke *de nostre pays* estas ne «de nia loko», sed pli vaste «el nia provinco» aŭ simile (ĉar «nian lokon» Lubin certe konas). Per la unua tripunkto li rezignas pri la vera nomo, kaj provas rememori la pseŭdan. Zamenhofo tion probable ne komprenis, kaj preterlasis la vorton *chose* (io). — *elparolaĉas tiun nomon* — Zamenhofo fidele tradukis la ne tute trafan verbon molieran.

**Georgo Dandin.** — Ĉu ĝi estas tiu juna kortegano, kiu loĝas ...

**Lubin.** — Jes, apud tiuj arboj.

**Georgo Dandin** *al si mem.* — Ha, tio estas la kaŭzo, ke antaŭ nelonge tiu sinjoreto prenis loĝejon kontraŭe de mi! Videble mi havis bonan nazon, kaj lia najbareco tuj estis por mi suspekta.

**Lubin.** — Vorton de honoro! li estas la plej honesta<sup>13</sup> homo, kiun oni iam vidis. Li donis al mi tri orajn monerojn, por ke mi nur iru diri al la virino, ke li ŝin amas, kaj ke li tre dezirus havi la honoron paroli kun ŝi. Nu, diru, ĉu ĝi estas granda laboro, por ke li devu pagi al mi tiel bone? kaj kio estas, en komparo kun tio, tuta tago da laborado, kiu donas al mi ne pli ol dek soldojn!

**Georgo Dandin.** — Nu, ĉu vi plenumis vian komision?

**Lubin.** — Jes; mi trovis tie iun Klaŭdino, kiu tuj en la unua momento komprenis, kion mi volas, kaj enkondukis min al sia mastrino.

**Georgo Dandin** *al si mem.* — Ha, fripona servantino!

**Lubin.** — Al la diablo! Tiu Klaŭdino estas tute bela; ŝi

---

Fakte por Lubin malfacilas ne prononco, sed la ekzota nomo komedia: «Neniam mi sukcesos memorfiksi tiun strangan nomon...». Cetere, en iuj eldonoj li rememoras mise: «Kli ... Klitando» (sen *r*).

<sup>13</sup> *honest* — Ĉi tie la franca vorto *honnête* signifas ne *honest*, sed *honorinda* aŭ *afabla*. Kp la arkaikan francan dankoformulon «*Vous êtes bien honnête*» (t.e. «Vi estas tre afabla»).

akiris mian amon, kaj ĝi nur dependos de ŝi, ke ni fariĝu geedzoj.

**Georgo Dandin.** — Sed kian respondon donis la mastro al tiu sinjoro kortegulo?

**Lubin.** — Ŝi ordonis, ke mi diru al li ... Atendu, mi ne scias, ĉu mi bone memoras ĉion ĉi tion ... Ŝi diris, ke ŝi estas al li tre danka por la amo, kiun li havas por ŝi; sed pro ŝia edzo, kiu estas stranga homo, li sin gardu, ke oni tion ne rimarku; kaj ke oni devos peni trovi ian rimedon, ke ili povu ambaŭ paroli inter si.

**Georgo Dandin** *al si mem.* — Ha, pendiginda virino!

**Lubin.** — Al la diablo! Estos tre amuze, ĉar la edzo eĉ ne suspektos la sekretaĵojn; tio estas la plej bona; kaj li havos longan nazon kun sia ĵaluzeco. Ne vere?

**Georgo Dandin.** — Certe vere.

**Lubin.** — Adiaŭ! Tenu la buŝon fermita. Konservu bone la sekreton, ke la edzo nenion sciui!

**Georgo Dandin.** — Jes, jes.

**Lubin.** — Kio min koncernas, mi ŝajnegos, ke mi nenion scias. Mi estas granda ruzulo, kaj neniu povos diri, ke mi havas ian rilaton al la afero.

## Sceno tria

**Georgo Dandin** *sola*. — Nu, Georgo Dandin, vi vidas, en kia maniero via edzino kun vi agas! Jen kio venas, se oni volis edziĝi kun fraŭlino<sup>14</sup>! Oni ĉirkaŭbatas vin de ĉiuj flankoj, kaj vi eĉ ne povas venĝi, kaj la nobeleco ligas al vi la manojn. Egaleco de la statoj lasas almenaŭ al la honoro de edzo la liberecon montri siajn sentojn; kaj se ĝi<sup>15</sup> estus kampulino, vi estus nun tute libera fari al vi justecon per bona porcio da bastonbatoj. Sed vi volis gustumi nobelecon, kaj tedis vin esti mastro en via domo. Ha, mi furiozas el mia tuta koro, kaj mi volonte donus al mi vango-frapojn. Kiel senhonte aŭskulti la amesprimon de sinjoretoto kaj al tio promesi ankoraŭ interkomunikiĝon! La diablo ĝin prenu! Tiaspecan okazon mi ne volas preterlasi. Kiel mi nun staras, mi devas tuj iri plendi al la patro kaj al la patrino kaj fari ilin atestantoj de la ĉagrenoj kaj malhonoro, kiun ilia filino al mi kaŭzas. Sed, jen, ili ambaŭ venas, tre ĝustatempe.

---

<sup>14</sup> *edziĝi kun fraŭlino* — T.e. «edziĝi al nobelidino». Kp ĉi-sube en la noto [37] (1:7).

<sup>15</sup> *se ĝi estus kampulino* — France: *si c'était une paysanne*, t.e. «se tio estus kampulino». En Esperanto la frazo estus pli klara kun «ŝi»: «se ŝi estus kampulino».

## Sceno kvara

*S-ro de Sotenville, s-ino de Sotenville, Georgo Dandin.*

**S-ro de Sotenville.** — Kio estas, mia bofilo? Ŝajnas al mi, ke vi estas tre ekscitita.

**Georgo Dandin.** — Kaj mi havas kaŭzon por tio, kaj...

**S-ino de Sotenville.** — Mia Dio! Kiel malmulte da ĝentileco vi havas, ke vi ne salutas la homojn, kiam vi aliras al ili!

**Georgo Dandin.** — KREDU al mi, mia bopatrino, mi havas aliajn aferojn en la kapo; kaj...

**S-ino de Sotenville.** — Denove! Ĉu estas eble, nia bofilo, ke vi tiel malmulte konas la mondajn postulojn, kaj oni ne povas lernigi al vi la manieron, en kiu oni devas vivi inter personoj de bona deveno<sup>16</sup>?

**Georgo Dandin.** — Kial?

**S-ino de Sotenville.** — Ĉu vi neniam en rilato al mi formetos la familiarecon de tiu vorto «bopatrino»? kaj ĉu vi ne povus al kutimiĝi diri al mi «sinjorino»?

**Georgo Dandin.** — Al ĉiuj patronoj! Se vi min nomas

---

<sup>16</sup> *personoj de bona deveno* — Tio estus taŭga traduko por *les personnes de condition*. Sed s-ino de Sotenville diras *les personnes de qualité*, kio estus *personoj de eminenta deveno* (kies nobeleco estas antikva kaj glora).

via bofilo, ŝajnas al mi, ke mi povas vin nomi mia bopatrino!

**S-ino de Sotenville.** — Oni forte povus ion diri kontraŭ tio, kaj la aferoj ne estas egalaj. Sciu do, mi petas, ke ne por vi ĝi estas konvena uzi tiun vorton kun persono de mia situacio<sup>17</sup>; ke, kvankam vi estas nia bofilo, estas granda diferenco inter vi kaj ni, kaj vi devas koni vin mem<sup>18</sup>.

**S-ro de Sotenville.** — Sufiĉe pri tio, mia amata; ni lasu ĝin.

**S-ino de Sotenville.** — Mia Dio! sinjoro de Sotenville, vi havas ian apartan malseverecon, kaj vi ne scias devigi la homojn doni al vi tion, kio al vi decas.

**S-ro de Sotenville.** — Al la diablo! Pardonu, pri tio oni ne povas fari al mi lecionojn, kaj en la daŭro de mia vivo, mi per dudek bravaj agoj montris, ke mi ne estas homo, kiu lasus defali eĉ unu colon de miaj pretendoj<sup>19</sup>; sed nun sufiĉas, ke ni donis al li negrandan averton. Nun ni iom aŭdu, mia bofilo, kion vi havas en via kapo.

**Georgo Dandin.** — Ĉar mi devas paroli kategorie, mi

17 ... ke por vi ne konvenas uzi tiun vorton pri persono de mia rango.

18 *koni vin mem* — Ĉi tie la franca *se connaître* ne estas la sokrata «ekkonu vin mem», sed la moŝtula «ne forgesu, kio vi estas», «sciu kia estas via loko», «konsciu pri via malalta rango».

19 *unu colon de miaj pretendoj* — En la lingvo zamenhofa devus esti «unu colon **da** miaj pretendoj» (kp «metron da nigra drapo» en la fundamenta *Ekzercaro*, §32).



diros al vi, sinjoro de Sotenville, ke mi havas kaŭzon...

**S-ro de Sotenville.** — Kviete, mia bofilo! Sciuj, ke ne estas respektite, paroli al homoj per ilia nomo, kaj ke al tiuj, kiuj staras pli alte ol ni, oni devas diri simple «sinjoro».

**Georgo Dandin.** — Nu, bone, simple sinjoro, kaj ne plu sinjoro de Sotenville, mi devas diri al vi, ke mia edzino ....

**S-ro de Sotenville.** — Haltu; sciu ankaŭ, ke vi ne devas diri «mia edzino», kiam vi parolas pri nia filino.

**Georgo Dandin.** — Mi povas fariĝi furioza! Kiel! Mia edzino ne estas mia edzino?

**S-ro de Sotenville.** — Jes, nia bofilo, ŝi estas via edzino; sed vi ne devas permesi al vi nomi ŝin tiel; vi povus tion fari, se vi estus edzigita kun persono de via klaso.

**Georgo Dandin** *al si mem.* — Ha, Georgo Dandin kien vi enŝoviĝis! (*Laŭte.*) He, mi vin petas, lasu por momento flanke vian nobelecon kaj permesu, ke mi parolu al vi, kiel mi povas. (*Al si mem.*) La diablo prenu ĉiujn ĉi malbenitajn ceremoniojn! (*Al s-ro de Sotenville.*) Mi diras do al vi, ke mi estas malkontenta pri mia edziĝo.

**S-ro de Sotenville.** — Kaj la kaŭzo, mia bofilo?

**S-ino de Sotenville.** — Kio! Paroli tiamaniere pri afero, el kiu vi eltiris tiajn grandajn profitojn!

**Georgo Dandin.** — Kaj kiajn profitojn, sinjorino, se sinjorino nepre volas sin enmiksi? La historio estis ne malbona por vi, ĉar sen mi viaj aferoj — volu min pardoni — estis tre kadukaj, kaj mia mono servis por ŝtopi tre rimarkeblajn truojn; sed mi, kion mi profitis, mi vin petas? nur plilongigon de mia nomo, ĉar anstataŭ «Georgo Dandin» mi ricevis de vi la titolon «sinjoro de la Dandinière<sup>20</sup>».

**S-ro de Sotenville.** — Ĉu vi kalkulas kiel nenion, mia bofilo, la honoron, ke vi parenĉiĝis kun la domo de Sotenville?

**S-ino de Sotenville.** — Kaj kun la domo de la Prudoterie<sup>21</sup>, el kiu mi havas la honoron deveni; domo, en kiu ankaŭ la virina linio nobeligas, kaj kiu, dank' al la bela privilegio, faros viajn infanojn nobeloj?

**Georgo Dandin.** — Jes, tre bone, miaj infanoj estos nobeloj, sed mi estos trompita koko<sup>22</sup>, se oni ne faros or-

20 *Dandinière* — Voĉlegu /dandinjèr/.

21 *Prudoterie* (t.e. «Prudeco», voĉlegu /prüdotrí/) — Fikcia nomo familio (gento), glora pro la prudeco de siaj anoj. Samfunkcie ĝi aperas ankaŭ ĉe Lafonteno.

22 *trompita koko* — Ĉi tiu naiva germaneca provo esperantigi la francan *cocu* surbaze de hazarda sona simileco estas malklara kaj neimintinda: nenio en koko pensigas pri trompita edzo (la logika asociaĵo estas kun plie kun haremo). La franca esprimo estas ŝuldata al alia birdo, kukolo, kiu metas siajn ovojn en fremdajn nestojn; do, *kokrito* estas, laŭ tiu metaforo, «kukolito» (kp la mezanglan pruntvorton *cuckold*). France

don.

**S-ro de Sotenville.** — Kion vi volas diri, mia bofilo?

**Georgo Dandin.** — Mi volas diri, ke, via filino ne kondutas tiel, kiel edzino devas konduti, kaj ke ŝi faras aferojn, kiuj estas kontraŭaj al la honoro.

**S-ino de Sotenville.** — Haltu; gardu vin pri tio, kion vi parolas. Mia filino devenas de gento, kiu estas tro plena de virto, por fari iam ian aferon, de kiu la honesteco<sup>23</sup> povus esti difektita; kaj, koncerne la domon de la Prudoterie, oni dank' al Dio de tricent jaroj tie ne vidis virinon<sup>24</sup>, kiu donus kaŭzon, ke oni parolu pri ŝi.

**S-ro de Sotenville.** — Al la diablo! En la domo de So-

la koncernaj vortoj sonas simile, kaj la francoj mem ne plu konscias la metaforon (ankaŭ la PIV-a «kokri» probable venas el simila miskompreno; simile pri la germana mispaŭsaĵo *der Hahnrei*). Multe pli internacia (eĉ se neniom pli logika) estas la korno-idiomaĵo: «miaj infanoj estos nobeloj, kaj mi estos kornulo». Кр en la pola: «Dziecie me będą szlachtą, *ale ja rogatym*»; ruse: «а я буду носить рога».

<sup>23</sup> *honesteco* — Mistraduko laŭvorta, temas pri *honoro*. (La francoj preferas uzi neĝustan vorton ol ripeti la ĵuse diritan.)

<sup>24</sup> *oni de tricent jaroj tie ne vidis virinon* — Stranga uzo de *de*, malpli klara ol en la originalo. Ŝajnas ke tekstopeco perdiĝis ĉe la traduko, de-  
vus esti «kaj koncerne la domon de la Prudoterie, oni jam dum *pli ol* tricent jaroj ne vidis tie virinon, dank' al Dio, kiu donus pretekston por klaĉo» (*et de la maison de la Prudoterie il y a plus de trois cents ans qu'on n'a point remarqué qu'il y ait eu une femme, Dieu merci, qui ait fait parler d'elle*). Ankaŭ ĉi tie Zamenhofo iom glatigis la frazon, forigante la komikan efekton de momenta miskompreno: «dum pli ol tricent jaroj oni ne vidis tie virinon, dank' al Dio!»

tenville oni neniam vidis koketulinon; kaj la ĉasteco de la virinoj tie estas ne malpli hereda, ol la kuraĝeco de la viroj.

**S-ino de Sotenville.** — Ni havis ~~ian~~ Jakelinon de la Prudoterie<sup>25</sup>, kiu ne volis esti amdonantino de duko kaj regna konsilisto, reganto de nia provinco.

**S-ro de Sotenville.** — Ekzistis ~~ita~~ Maturino de Sotenville, kiu rifuzis akcepti dudek mil talerojn<sup>26</sup> de reĝa favorato, kiu volis nur havi la privilegion libere paroli kun ŝi.

**Georgo Dandin.** — Nu, via filino ne estas tiel obstina, kaj ŝi fariĝis malpli sovaĝa de la tempo, kiam ŝi estas ĉe mi.

**S-ro de Sotenville.** — Parolu pli klare, mia bofilo. Ni ne estas tiaj homoj, kiuj protektus ŝin en malbonaj faroj, kaj ni ja unuaj, ŝia patrino kaj mi, estas pretaj doni al vi justecon pri tio.

**S-ino de Sotenville.** — Ni komprenas neniajn ŝercojn<sup>27</sup>

<sup>25</sup> Ni havis *ian* Jakelinon de la Prudoterie — Ĉiu tiu uzo de *iu* por traduki la francan nedifinan artikolon estas embarasa en esperanta traduko. Endus malvolvi la implicitan signifon («ni havis *tiajn praulinojn*, *kia* ...» aŭ eble «ni havis *ekzemple*, ...»); aŭ (pli bone) simple forigi tiujn pakumojn, sen liuj la dialogo iĝus pli energia kaj flua:

— Ĵaklino de la Prudoterie ne volis esti amdonantino...

— Maturino de Sotenville rifuzis...

<sup>26</sup> *taleroj* — Ĉe Moliero kompreneble temas pri eskudoj (france *écus*). Probable Zamenhofo uzis «talero»n kiel ĝeneralan nomon de ĉia arĝenta monero historia.

en aferoj, kiuj koncernas honoron, kaj ni edukis ŝin en la plej granda severececo.

**Georgo Dandin.** — Ĉio, kion mi povas diri, estas, ke troviĝas ĉi tie iu kortegulo, kiun vi vidis, kiu montras al ŝi amon antaŭ mia nazo, kaj kiu faris al ŝi pri sia amo certigan klarigon, kiun ŝi aŭskultis tre homame<sup>28</sup>.

**S-ino de Sotenville.** — Granda Dio! Mi ŝin sufokus per miaj propraj manoj, se montriĝus, ke ŝi dekliniĝis de la honesteco de sia patrino.

**S-ro de Sotenville.** — Al la diablo! Mi trapikus per mia spado ŝin kaj ŝian amanton, se ŝi pekus kontraŭ sia honoro.

**Georgo Dandin.** — Mi rakontis al vi la fakton, por prezenti al vi miajn plendojn; kaj mi postulas de vi kontentigon pri tiu afero.

**S-ro de Sotenville.** — Estu tute trankvila, mi donos al vi kontentigon de la flanko de ili ambaŭ<sup>29</sup>; al kiu ajn oni devas meti la pugnon al la brusto<sup>30</sup>, mi taŭgas por tio. Sed,

---

27 ni komprenas neniam ŝercojn — Ni akceptas (aŭ ni toleras) neniam ŝercojn. La franca konfuzo inter «kompreni ŝercon» (*entendre raillerie*) kaj «akcepti ŝercon» estas tro mallogika por lingvo internacia: oni povas ofendiĝi ĝuste ĉar oni bone komprenas la mokon.

28 tre homame — En la franca same mise: *très humainement*. Ĉu Moliero volis demonstri mallertecon de Georgo Dandin? Probable ne, ĉar france la mallertaĵo sonas malpli ĝene (ĉar kliŝe). Pli neŭtralaj kaj same ironiaj tradukoj povus esti «tre indulgeme» aŭ «tre korfavore».

29 ili ambaŭ — Angeliko kaj Klitandro.

Ĉu vi estas tute certa pri tio, kion vi diras al mi?

**Georgo Dandin.** — Tute certa.

**S-ro de Sotenville.** — Gardu vin bone; ĉar inter nobleloj tio ĉi estas tiklaj aferoj, kaj estas danĝere, se oni faras en tio ian maltrafon.

**Georgo Dandin.** — Mi diris al vi nenion, kio estus malvera.

**S-ro de Sotenville.** — Mia koro, iru paroli kun via filino, dum mi kun mia bofilo iros paroli kun la viro.

**S-ino de Sotenville.** — Ĉu ĝi estas ebla, mia filo, ke ŝi sin tiom forgesus, post la virta ekzemplo, kiun, kiel vi mem scias, mi donis al ŝi!

**S-ro de Sotenville.** — Ni klarigos la aferon. Sekvu min, mia bofilo, kaj zorgu pri nenio. Vi vidos, per kia ligno ni nin hejtas<sup>31</sup>, kiam oni faras atencon pri tiuj, kiuj apartenas al ni.

**Georgo Dandin.** — Jen li mem venas al ni renkonte.

<sup>30</sup> *meti la pugnon al la brusto* — Interpugnado ne konvenus al franca nobelo mezaĝa; Zamenhofo miskomprenis la francan *serrer le bouton à quelqu'un*, kiu ĉi-okaze estas la figursenca «bridi»: «Mi povas bridi iun ajn». (*Bouton* estas ĉi-okaze ne «butono», sed leda ringo, kiun oni povas glitigi laŭ paro da bridroj, por ilin streĉi.)

<sup>31</sup> Pala traduko de egale pala franca metaforo: *Vous verrez de quel bois nous nous chauffons*. Pli lerte en la angla: *You shall see what Mettle I am made of, when those that belong to me are meddl'd with*.

## Sceno kvina

*S-ro de Sotenville, Klitandro, Georgo Dandin.*

**S-ro de Sotenville.** — Sinjoro, ĉu vi min konas?

**Klitandro.** — Kiom mi scias, ... ne.

**S-ro de Sotenville.** — Mia nomo estas barono de Sotenville.

**Klitandro.** — Mi tre ĝojas.

**S-ro de Sotenville.** — Mia nomo estas konata de la kortego; kaj en mia juneco mi havis la honoron esti el la unuaj, kiuj distingiĝis ĉe la nobelara armiĝo en Nancy<sup>32</sup>.

**Klitandro.** — Mi gratulas.

**S-ro de Sotenville.** — Sinjoro mia patro, Jean-Gilles<sup>33</sup> de Sotenville, havis la gloron partopreni persone en la granda sieĝo de Montauban<sup>34</sup>.

**Klitandro.** — Mi estas ravita.

---

<sup>32</sup> *la nobelara armiĝo en Nancy* — Per «nobelara armiĝo» Zamenhofo tradukas la francan *l'arrière-ban*, kunvoko de nobelaro de provinco (ĉi-okaze de Loreno, kies ĉefurbo estis Nansio) por 3-monata proprakosta militservo, por defendi la landon kontraŭ malamiko.

<sup>33</sup> *Jean-Gilles* — Voĉlegu /ʒan-ʒil/.

<sup>34</sup> *Montauban* — Voĉlegu /montobán/. Urbo sudokcidente de Francio (okcitane *Montalban*). Malgraŭ la epiteto «granda» ne temas pri grava evento. Probable temas pri la senrezulta sieĝo okazinta en 1621 (unu jaron antaŭ la naskiĝo de Moliero), baldaŭ ĉesigita pro maldisciplinemo de la armeo.

**S-ro de Sotenville.** — Mi havis praavon, Bertrandon de Sotenville, kiu estis tiel eminenta en sia tempo, ke li ricevis la permeson vendi sian tutan bienon, por veturi trans la maron<sup>35</sup>.

**Klitandro.** — Mi volonte kredas.

**S-ro de Sotenville.** — Oni raportis al mi, sinjoro, ke vi amas kaj persekutas<sup>36</sup> iun junan personon, kiu estas mia fi-lino, kaj pri kiu mi interesiĝas tiel same, kiel pri la homo, kiun vi vidas (*montrante Georgon Dandin*), kaj kiu havas la honoron esti mia bofilo.

**Klitandro.** — Kiu? mi?

**S-ro de Sotenville.** — Jes; kaj estas al mi tre agrable paroli kun vi, por ricevi de vi, mi petas, klarigon pri tiu afero.

**Klitandro.** — Ĝi estas stranga kalumnio! Kiu tion diris al vi?

**S-ro de Sotenville.** — Iu, kiu pensas, ke li bone tion scias.

**Klitandro.** — Tiu iu mensogis. Mi estas honesta homo.

<sup>35</sup> *veturi trans la maron* — Veturi en la Sanktan Landon. Alivorte, la «praavo» (france *aïeul*) estis kruckavaliro. Do, temas ne pri «praavo», sed pri pli malproksima *praulo*.

<sup>36</sup> *vi amas kaj persekutas* — Mistraduko de la franca *vous aimez et poursuivez*. En Esperanto «persekuti» ne signifas «fi-amindumi, sin-trude sekvi, ĝeni». Ĉi-okaze sufiĉus «vi amas kaj amindumas» aŭ «vi amas kaj sekvas».



Ĉu vi opinias min kapabla, sinjoro, por tia malnobla agado? Mi amindumus junan kaj belan personon, kiu havas la honoron esti la filino de sinjoro barono de Sotenville! Mi tro multe vin respektas kaj tro multe estas preta vin servi, por ke mi faru ion similan. Kiu ajn tion diris al vi, estas malsaĝulo.

**S-ro de Sotenville.** — Nu, mia bofilo?

**Georgo Dandin.** — Kio?

**Klitandro.** — Estas fripono kaj sentaŭgulo.

**S-ro de Sotenville** *al Georgo Dandin.* — Respondu!

**Georgo Dandin.** — Respondu vi mem!

**Klitandro.** — Se mi scius, kiu li povas esti, mi enpuŝus al li, en via alesto, la spadon en la ventron.

**S-ro de Sotenville** *al Georgo Dandin.* — Pruvu do la aferon.

**Georgo Dandin.** — Ĝi estas tute pruvita. Ĝi estas vero.

**Klitandro.** — Ĉu ĝi estas via bofilo, sinjoro, kiu ...?

**S-ro de Sotenville.** — Jes, li estas ĝuste tiu, kiu plendis al mi pri tio.

**Klitandro.** — Certe, ĝi estas lia feliĉo, ke li havas la honoron aparteni al vi; alie mi bone instruus lin fari tiajn parolojn pri persono kiel mi.

## Sceno sesa

*S-ro de Sotenville, s-ino de Sotenville, Angeliko, Klitandro, Georgo Dandin, Klaŭdino.*

**S-ino de Sotenville.** — Koncerne tion mi devas diri, ke la ĵaluzo estas efektive stranga afero. Mi alkondukas ĉi tien mian filinon, por klarigi la aferon en ĉies alesto.

**Klitandro al Angeliko.** — Ĉu ĝi estas vi, sinjorino, kiu diris al via edzo, ke mi vin amas?

**Angeliko.** — Mi? Kiel mi povus tion diri al li? Ĉu ĝi estas vero? Mi volus efektive vidi, ke vi provus min ami! Provu ĝin, mi vin petas; vi vidus, kun kiu vi parolas! Mi konsilas al vi tion fari. Uzu ĉiujn artifikojn de amantoj; provu iom, por plezuro, sendi al mi sendatojn, skribi al mi sekrete amajn leteretojn, serĉi la momenton, kiam mia edzo ne estas hejme, aŭ kiam mi eliras, kaj parolu al mi pri via amo: vi bezonas nur veni, mi promesas al vi, ke vi estos dece akceptita.

**Klitandro.** — Nu, nu, sinjorino, kviete! Ne estas necese fari al mi tiom da lecionoj kaj tiom skandaliĝi. Kiu diris al vi, ke mi havas la ideon vin ami?

**Angeliko.** — Kiel mi povas scii, kion oni ĉi tie rakontis?

**Klitandro.** — Oni rakontu, kion oni volas; sed vi ja scias, ĉu mi parolis kun vi pri amo, kiam mi vin renkontis.

**Angeliko.** — Vi devus nur tion fari, vi havus bonan akcepton!

**Klitandro.** — Mi certigas vin, ke kun mi vi devas ne tion timi: mi ne estas tia homo, kiu faras ĉagrenon al belulinoj; kaj mi vin tro respektas, vin kaj viajn estimatajn gepatrojn, por ke mi havu la personon enamiĝi en vin.

**S-ino de Sotenville** *al Georgo Dandin.* — Nu, vi vidas?

**S-ro de Sotenville.** — Jen vi estas kontentigita, mia bofilo. Kion vi diros al tio?

**Georgo Dandin.** — Mi diros, ke tio estas fabeloj por enluliĝi; ke mi bone scias, kion mi scias, kaj ke, ĉar mi jam devas paroli klare, ŝi ĵus akceptis komisiulon de li.

**Angeliko.** — Mi? mi akceptis komisiulon?

**Klitandro.** — Mi sendis komisiulon?

**Angeliko.** — Klaŭdino?

**Klitandro** *al Klaŭdino.* — Ĉu estas vere?

**Klaŭdino.** — Mian vorton de honoro, ĝi estas stranga malveraĵo!

**Georgo Dandin.** — Silentu, vi malĉastulino. Mi bone vin konas. Ĝi estas vi, kiu ĵus enkondukis la komisiulon.

**Klaŭdino.** — Kiu? mi?

**Georgo Dandin.** — Jes, vi. Ne ludu rolon de purulino.

**Klaŭdino.** — Ho ve, kiel la mondo nun estas plena de malboneco! tiele min suspekti, min, kiu estas la senkulpeco mem!

**Georgo Dandin.** — Silentu, virinaĉo! vi ludas la rolon de modestulino, sed mi konas vin jam de longe, vi estas ruza kanajlo.

**Klaŭdino al Angeliko.** — Sinjorino, ĉu...

**Georgo Dandin.** — Silentu, mi diras al vi! alie vi povus tre kare pagi por ĉiuj, ĉar vi ja ne havas patron nobelon.

**Angeliko.** — Ĝi estas kalumnio tiel granda, kaj kiu tiel forte vundas mian koron, ke mi ne povas eĉ havi la forton por respondi. Ĝi estas ja io terura, esti akuzata de edzo, kiam oni faris al li nenion, kio estas ne farinda! Ho ve, se mi meritas ian riproĉon, ĝi estas nur tio, ke mi agis kun li tro bone.

**Klaŭdino.** — Certe.

**Angeliko.** — Mia tuta malfeliĉo estas tio, ke mi tro zorgas pri li; la ĉielo volu, ke mi estu kapabla toleri, kiel li diras, ies amindumaĵojn! mi ne estus tiam tiel plendinda. Adiaŭ, mi foriras; mi ne povas plu toleri, ke oni min tiamaniere ofendu.

## Sceno sepa

*S-ino de Sotenville, s-ro de Sotenville, Klitandro, Georgo Dandin, Klaŭdino.*

**S-ino de Sotenville** al *Georgo Dandin*. — Iru, vi ne meritias la honestan edzinon, kiun oni donis al vi.

**Klaŭdino**. — Vorton de honoro, li meritias, ke ŝi verigition, kion li diris; kaj, se mi estus sur ŝia loko, mi ne longe marĉandus. (*Al Klitandro.*) Jes, sinjoro, vi devus nun, por lin puni, amindumi mian mastrinon. Komencu kuraĝe, mi tion diras al vi, ĝi estos tre ĝustatempa kaj mi proponas al vi, ke mi vin helpos, ĉar li ja tiamaniere min jam taksas.

*Klaŭdino foriras.*

**S-ro de Sotenville**. — Vi meritias, mia bofilo, ke oni diru al vi tiajn aferojn: via agado indignigas ĉiujn kontraŭ vi.

**S-ino de Sotenville**. — Iru, penu agi pli bone kun fraŭlino<sup>37</sup> altedevena; kaj gardu vin de nun, ke vi plu ne

<sup>37</sup> Angeliko estas virino edziniĝinta, ŝi certe ne estas «fraŭlino». La vorto *demoiselle* en la franca fontteksto havas sian malnovan signifon

faru tiajn eraregojn.

**Georgo Dandin** *al si mem.* — Mi estas tute furioza, ke mi staras kiel malpravulo, dum mi estas prava.

## Sceno oka

*S-ro de Sotenville, Klitandro, Georgo Dandin.*

**Klitandro** *al s-ro de Sotenville.* — Sinjoro, vi vidas, kiel false mi estis akuzita: vi estas homo, kiu scias la principojn de honoro, kaj mi postulas de vi kontentigon por la honto, kiu estas farita al mi.

**S-ro de Sotenville.** — Tio estas tute justa kaj tute laŭ la ordo. Nu, mia bofilo donu kontentigon al la sinjoro.

**Georgo Dandin.** — Kio? kontentigon?

**S-ro de Sotenville.** — Jes, la ordo tion postulas, ĉar vi malprave lin akuzis.

**Georgo Dandin.** — Sed tio ja estas la afero, ke mi tute ne konsentas, ke mi lin malprave akuzis; kaj mi bone scias, kion mi pri tio pensas.

**S-ro de Sotenville.** — Tio ne estas grava. Kia ajn penso povus resti ĉe vi, li neis, kaj tio devas sufiĉi; kaj oni ne havas rajton plendi pri iu, se li neas kulpecon.

**Georgo Dandin.** — Sekve, se mi lin trovus kuŝanta<sup>38</sup>

«nobelidino» (filino de nobela familio).

kun mia edzino, li devus nur nei, kaj tio lin jam senkulpi-  
gus?

**S-ro de Sotenville.** — Ne rezonadu. Petu lin pri pardo-  
no, kiel mi diras al vi.

**Georgo Dandin.** — Mi! Mi devas ankoraŭ peti lin pri  
pardonno, post tio, ke...

**S-ro de Sotenville.** — Rapide, mi diras al vi, vi havas  
nenion por pripensi; kaj vi ne devas timi, ke vi faras tro  
multe, ĉar mi mem ja tion konsilas al vi.

**Georgo Dandin.** — Mi ne povas...

**S-ro de Sotenville.** — Al la diablo! mia bofilo, ne inci-  
tu al mi la galon, ĉar mi kuniĝus kun li kontraŭ vi. Nu, la-  
su, ke mi vin gvidu.

**Georgo Dandin** *al si mem.* — Ha, Georgo Dandin!

**S-ro de Sotenville.** — Antaŭ ĉio prenu vian ĉapon en  
la manon: la sinjoro estas nobelo, kaj vi ne estas tia.

**Georgo Dandin** *al si mem, tenante la ĉapon en la ma-  
no.* — Mi krevas de furiozo!

**S-ro de Sotenville.** — Ripetu post mi: «Sinjoro ...»

**Georgo Dandin.** — «Sinjoro ...»

**S-ro de Sotenville.** — «Mi petas vian pardonon ...»  
(*Vidante, ke Georgo Dandin penas ne obei lin.*) Ha!

---

38 *mi lin trovus kuŝanta* — Jen la ĝusta objekta predikativo (en nomi-  
nativo). Kp la noton [10] pri la misa «vidis min eliranta» (1:2).

**Georgo Dandin.** — «Mi petas vian pardonon ...»

**S-ro de Sotenville.** — «Pri la malbonaj pensoj, kiujn mi havis rilate vin ...»

**Georgo Dandin.** — «Pri la malbonaj pensoj, kiujn mi havis rilate vin ...»

**S-ro de Sotenville.** — «Ĝi estis kaŭzita de tio, ke mi ne havis la honoron vin koni ...»

**Georgo Dandin.** — «Ĝi estis kaŭzita de tio, ke mi ne havis la honoron vin koni ...»

**S-ro de Sotenville.** — «Kaj mi petas vin kredi ...»

**Georgo Dandin.** — «Kaj mi petas vin kredi ...»

**S-ro de Sotenville.** — «Ke mi estas via servanto.»

**Georgo Dandin.** — Vi volas, ke mi estu servanto de homo, kiu volas fari min trompita koko?

**S-ro de Sotenville** *farante al li signon de minaco.* — Ha!

**Klitandro.** — Sufiĉas, sinjoro.

**S-ro de Sotenville.** — Ne, mi volas, ke li finu, kaj ke ĉio estu farata laŭforme «... Ke mi estas via servanto.»

**Georgo Dandin.** — «Ke mi estas via servanto.»

**Klitandro** *al Georgo Dandin.* — Sinjoro, mi estas tutkore via, kaj mi plu ne pensas pri tio, kio okazis. (*Al s-ro de Sotenville.*) Al vi, sinjoro, mi diras adiaŭ, kaj mi bedaŭras la malgrandan ĉagrenon, kiun vi havis.



**S-ro de Sotenville.** — Ni kisas al vi la manojn<sup>39</sup>; kaj se  
 40 ĝi plaĉos al vi, mi liveros al vi la amuziĝon ĉasi kun mi  
 leporon.

**Klitandro.** — Vi estas tro bona kontraŭ mi.

*Klitandro foriras.*

**S-ro de Sotenville.** — Jen, mia bofilo, kiel oni devas  
 konduki la aferojn! Adiaŭ. Sciu, ke vi eniris en familion,  
 kiu donos al vi apogon kaj neniam toleros, ke oni faru al  
 vi ian honton.

## Sceno naŭa

**Georgo Dandin sola.** — Ha, kiel mi ... Vi ĝin volis, vi  
 ĝin volis, Georgo Dandin, vi ĝin volis! Ĝi konvenas al vi  
 bone, kaj vi estas ĝuste aranĝita: vi havas juste tion, kion  
 vi meritis. Nu, oni devas nur malfermi la okulojn al la pa-  
 tro kaj al la patrino; eble mi trovos ian rimedon, por tion  
 atingi.

---

39 Supozeble en la moliera epoko tiu formulo povis soni komike kiel  
*iom* troiga; sed nun ĝi sonas kiel *tro* troa, kaj ne plu amuze. En moder-  
 na traduko endus trovi ion pli moderan.

40 France la konjunkcio estas *kiam* (*quand*): «kaj kiam plaĉos al  
 vi ...».

# Akto dua

## Sceno unua

*Klaŭdino, Lubin.*

**Klaŭdino.** — Jes, mi tuj divenis ke ĝi certe venas de vi, kaj ke vi ĝin diris al iu, kiu ĉion rakontis al nia mastro.

**Lubin.** — Mi ĵuras al vi, mi nur pasante diris pri ĝi unu vorton al iu homo, por ke li ne diru, ke li vidis, ke mi eliris el la domo; videble la homoj en tiu ĉi lando estas grandaj babiluloj.

**Klaŭdino.** — Efektive, sinjoro la vicgrafo faris bonan elekton, prenante vin kiel sian sendaton! li uzas la servon de homo tre dube fidinda!

**Lubin.** — Nu, alian fojon mi estos pli ruza kaj mi pli min gardos.

**Klaŭdino.** — Jes, jes, estos la ĝusta tempo.

**Lubin.** — Ni ne parolu plu pri tio. Aŭskultu.

**Klaŭdino.** — Kion vi volas, ke mi aŭskultu?

**Lubin.** — Turnu iom vian vizaĝon al mi.

**Klaŭdino.** — Nu, kion do vi volas?

**Lubin.** — Klaŭdino!

**Klaŭdino.** — Kio?

**Lubin.** — He, he, ĉu vi ne scias tre bone, kion mi volas diri?

**Klaŭdino.** — Ne.

**Lubin.** — Al la diablo! mi vin amas.

**Klaŭdino.** — Efektive?

**Lubin.** — Jes, la diablo min prenu! Vi povas kredi al mi, ĉar mi ĝin ĵuras.

**Klaŭdino.** — Nu, bone.

**Lubin.** — Mi sentas, ke mia tuta koro tremas, kiam mi vin rigardas.

**Klaŭdino.** — Mi tre ĝojas.

**Lubin.** — Kiamaniere vi tion faras, ke vi estas tiel bela?

**Klaŭdino.** — Tiel same, kiel faras la aliaj.

**Lubin.** — Vidu, oni ne bezonas tiom da ceremonioj: se vi volas, vi estos mia edzino kaj mi estos via edzo; kaj ni ambaŭ estos geedzoj.

**Klaŭdino.** — Vi eble estus tiel ĵaluza, kiel nia mastro?

**Lubin.** — Tute ne!

**Klaŭdino.** — De mia flanko, mi malamas la suspektemajn edzojn: kaj mi volas tian edzon, kiu ne timas ĉion, kiu estus tiom plena de konfido al mi kaj tiel certa pri mia ĉasteco, ke li sen maltrankvileco povus min vidi en la mezo de tridek viroj<sup>41</sup>.

**Lubin.** — Bone! mi estos tute tia.

**Klaŭdino.** — Ĝi estas la plej malsaĝa afero en la mondo, kiam oni ne konfidas al edzino, kaj oni ŝin turmentas. Kaj en efektiveco oni ĉe tio nenion gajnas: ĝuste tio devigas nin pensi pri malbono; kaj ofte la edzoj mem, per sia bruego, faras el si tion, kio ili estas.

**Lubin.** — Nu, mi donos al vi la liberecon fari ĉion, kio al vi plaĉos.

**Klaŭdino.** — Jen tiel oni devas agi, se oni ne volas esti trompata. Kiam edzo fidas nian honestecon<sup>42</sup>, ni prenas el la libereco nur tiom, kiom ni bezonas; ĝi estas tiel same, kiel kun tiuj, kiuj, malfermas al ni sian monujon kaj diras al ni: «Prenu!» Ni faras el ĝi uzon honeste<sup>43</sup>, kaj ni kontentiĝas per tio, kio estas justa. Sed se iu nin ĉikanas, ni penas lin tondi, kaj ni tute lin ne indulgas.

**Lubin.** — Bone, mi estos el tiuj, kiuj malfermas sian monujon, kaj vi bezonas nur edziniĝi kun mi.

**Klaŭdino.** — Bone, bone, ni vidos.

---

41 *en la mezo de tridek viroj* — La franca *au milieu de trente hommes* ne sonas tiom mallerte, kiel la traduko. Pli akcepteblaj estas «en la rondo de tridek viroj», «ĉirkaŭite de tridek viroj» aŭ «meze de tridek viroj» (*meze* ja escepte povas havi tiun signifon, sed ne la substantivo *mezo*).

42 *fidas nian honestecon* — «Fidas nian virton», «nian prudenton», aŭ — plej simple kaj bone — «fidas nin».

43 *Ni faras el ĝi uzon honeste* — «Ni uzas ĝin prudente» (aŭ «modeste»).

**Lubin.** — Venu do ĉi tien, Klaŭdino.

**Klaŭdino.** — Kion vi volas?

**Lubin.** — Venu, mi diras al vi.

**Klaŭdino.** — Ha, kviete! Mi ne amas la palpistojn.

**Lubin.** — He, iomete, pro amikeco.

**Klaŭdino.** — Lasu min, mi diras al vi: mi ne komprenas ŝercojn.

**Lubin.** — Klaŭdino!

**Klaŭdino** *repuŝante lin.* — He, for!

**Lubin.** — Ha, kiel kruda vi estas kun homoj! Fi! kiel neĝentila ĝi estas tiel forpuŝi personojn! Ĉu vi tute ne hontas esti bela kaj ne voli, ke oni vin karesu? He, lasu do!

**Klaŭdino.** — Mi donos al vi sur la nazon<sup>44</sup>.

**Lubin.** — Ho, kia malcedema, kia sovaĝa! Fi! Estas malbele esti tiel kruela!

**Klaŭdino.** — Vi fariĝas tro libera.

**Lubin.** — Kion do ĝi kostos al vi, se vi lasos min iom petoli kun vi?

**Klaŭdino.** — Vi devas havi paciencon.

**Lubin.** — Nur unu kiseton, partopage de nia edziĝo.

**Klaŭdino.** — Mi dankas por tio<sup>45</sup>.

44 Mi pugnos vin sur la nazon.

45 *Mi dankas por tio* — Per ĉi tiu antifrazo Zamenhofo anstataŭigis la malpli klaran francan rifuzan idiomaĵon *Je suis votre servante* (mi estas

**Lubin.** — Klaŭdino, mi vin petas, vi ĝin deprenos de la kalkulo.

**Klaŭdino.** — He, certe ne! Mi jam unu fojon enfalis. Adiaŭ! Iru for, kaj diru al sinjoro la vicgrafo, ke mi akurate transdonos lian bileton.

**Lubin.** — Adiaŭ, sovaĝa belulino!

**Klaŭdino.** — La vorto montras enamiĝon.

**Lubin.** — Adiaŭ, roko, ŝtono, marmoro, ĉio plej mal-mola en la mondo.

**Klaŭdino sola.** — Mi tuj transdonos en la manojn de mia mastrino ... Sed jen ŝi venas kun sia edzo; mi foriĝu kaj atendu, ĝis ŝi estos sola.

---

via servistino). Ĝi estas pli komprenebla (kiel rifuza formulo: «Ĉu vi deziras teon?» — «Ne, dankon.»), tamen solstare ĝi restas ambigua. Pli bona traduksolvo estus permuti ĉi tiun kaj la sekvan replikojn de Klaŭdino: «He, certe ne!» (...) «Grandan dankon, mi jam unu fojon enfalis.» Tio konservas la ironion de la dankoformulo, kaj estas nemiskomprenebla.

## Sceno dua

*Georgo Dandin, Angeliko.*

**Georgo Dandin.** — Ne, ne, oni ne trompas min tiel facile; kaj mi nur estas tro certa, ke tio, kion oni diris al mi, estas vera. Mi havas pli bonajn okulojn, ol kiel oni pensas, kaj via galimatio<sup>46</sup> tute min ne blindigis.

## Sceno tria

*Klitandro, Angeliko, Georgo Dandin.*

**Klitandro** *aparte, en la profundo de la scenejo.* — Ha,

---

46 Laŭ PIV **galimatio** estas «Konfuzega, sensenca, tute nekomprenebla diraĵo aŭ skribaĵo». Tia efektive estas la nuna franca kaj la internacia signifo de la vorto, sed ĉi-okaze ĝi situacie malkonvenas. La paroloj de Angeliko kaj Klitandro estas neniom sensencaj aŭ nekompreneblaj; sed ili estas malveraj, ili estas misprezento. Ĉe Moliero *galimatias* povas signifi «konfuzo, implikaĵo» — la signifo kiun la esperanta *galimatio* ne havas. Sian riproĉon Georgo Dandin pli konvene devus adresi al siaj bogepatroj: «Kiel vi la nobeloj komplikas ĉion!»; sed ankaŭ Angeliko ja estas nobelidino. — Kurioze, ĝuste ĉi tiun malkonvenan mistradukon (kiu ŝajnas esti la sola uzo zamenhofa) PIV donas por ilustrati la vorton *galimatio*. La nacilingvaj tradukoj elektas aliajn vortojn por traduki ĉi tiun replikon — ekz-e la angla traduko de 1732 tradukas tion per «Kanterbera rakonto»: *I've better eyes than people fancy, and your Canterbury Story has not taken away my Senses*; la pola traduko (Fafuło) havas *elturniĝojn* (wykrętanina) ktp.

jen ŝi estas; sed ŝia edzo estas kune kun ŝi.

**Georgo Dandin** *ne vidante Klitandron.* — Trae de ĉiuj viaj grimacoj mi vidis la verecon de tio, kion oni diris al mi, kaj kiom da respekto vi havas por la ligo, kiu nin unuigas. (*Klitandro kaj Angeliko reciproke sin salutas.*) Mia Dio, lasu vian riverencon; ne pri tia speco de respekto mi parolas al vi, kaj vi ne devas ankoraŭ moki.

**Angeliko.** — Mi? mi mokas? neniel!

**Georgo Dandin.** — Mi scias, kion vi pensas, kaj mi konas ... (*Klitandro kaj Angeliko sin denove reciproke salutas.*) Denove! Ha, ĉesu do fari ŝercojn! Mi scias tre bone, ke pro via nobeleco vi rigardas min, kiel starantan tre malsupre de vi; sed la respekto, pri kiu mi parolas al vi, tute ne koncernas mian personon. Mi parolas pri tiu respekto, kiun vi ŝuldas al ligo tiel estimeginda, kiel estas la ligo de edzeco ... (*Angeliko faras signon al Klitandro.*) Ne levu la ŝultrojn, mi tute ne parolas malsaĝaĵojn.

**Angeliko.** — Sed kiu levas la ŝultrojn?

**Georgo Dandin.** — Mia Dio! Mi vidas tre klare. Mi diras al vi ankoraŭ unu fojon, ke la edzeco estas ĉeno, al kiu oni devas rilati kun la plej granda respekto, kaj estas tre malbone, fari el ĝi tian uzon, kian vi faras. (*Angeliko faras al Klitandro signon per la kapo.*) Jes, jes, tre malbone de via flanko; kaj vi tute ne bezonas balanci la ka-



pon kaj fari al mi grimacojn.

**Angeliko.** — Mi? mi ne scias, kion vi volas diri.

**Georgo Dandin.** — Sed mi tion scias tre bone; kaj vian malestimon mi konas. Se mi ne naskiĝis nobelo, almenaŭ mi estas el familio, al kiu oni povas fari nenium riproĉon; kaj la familio de la Dandinoj...

**Klitandro** *malantaŭ Angeliko, nerimarkate de Georgo Dandin.* — Nur unu vorton!

**Georgo Dandin** *ne vidante Klitandron.* — Kio?

**Angeliko.** — Kio? mi nenion diris.

*Georgo Dandin turnas sin ĉirkaŭ sian edzinon, kaj Klitandro foriĝas, farante grandan riverencon al Georgo Dandin.*

## Sceno kvara

*Georgo Dandin, Angeliko.*

**Georgo Dandin.** — Jen li vagis ĉirkaŭ vi!

**Angeliko.** — Nu, ĉu ĝi estas mia kulpo? Kion vi volas, ke mi faru kontraŭ tio?

**Georgo Dandin.** — Mi volas, ke vi faru kontraŭ tion, kion faras virino, kiu volas plaĉi nur al sia edzo. Kion ajn oni dirus, la amistoj altrudas sin nur tiam, kiam oni tion akceptas. Ekestas certa dolĉa mieno, kiu ilin altiras, tiel same, kiel la mielo la muŝojn; sed la honestaj virinoj havas rimedojn, kiuj forpelas ilin tuj en la komenco.

**Angeliko.** — Mi ilin forpeli! Sed pro kia kaŭzo? Mi tute ne vidas en ĝi ian skandalon, se oni min trovas bela kaj tio faras al mi plezuron.

**Georgo Dandin.** — Jes! Sed kiun rolon la edzo povas ludi ĉe tiu ĉi amindumado?

**Angeliko.** — La rolon de honesta<sup>47</sup> homo, kiu ĝojas, se lia edzino estas ŝatata.

**Georgo Dandin.** — Mi vin tre dankas por tio. Ĝi tute ne estas laŭ mia gusto; kaj la Dandinoj tute ne al kutimiĝis al tiu modo.

---

<sup>47</sup> honesta — prudenta, deca.

**Angeliko.** — Ho, la Dandinoj al kutimiĝos, se ili volos; ĉar miaflanke mi deklaras al vi, ke mi ne havas la intencon forrifuzi la mondon kaj vivante enterigi min en edzon. Kio! ĉar viro ekpensas edziĝi kun ni, tial estas necese, ke ĉio finiĝu por ni kaj ke ni rompu ĉiujn interrilatojn kun la vivantoj! Ĝi estas mirinda afero, tiu tiraneco de sinjoroj la edzoj; kaj tio al mi plaĉas, ke ili volas, ke oni mortu por ĉiuj amuzoj kaj oni vivu nur por ili! Mi mokas tion, kaj mi tute ne volas morti tiel juna.

**Georgo Dandin.** — Tiele do vi plenumas la ŝuldiĝon de la ĵuro<sup>48</sup>, kiun vi faris al mi publike?

**Angeliko.** — Mi? mi ne faris ĝin al vi propravole, vi ĝin elŝiris de mi. Ĉu antaŭ la edziĝo vi demandis pri mia konsento kaj ĉu mi vin volas? Vi demandis pri tio nur mian patron kaj mian patriron; en efektiveco ja nur ili edziĝis kun vi<sup>49</sup>; tial estos bone, se vi ĉiam al ili plendos, se oni agas kun vi maljuste. Kio koncernas min, kiu ne petis vin, ke vi edziĝu kun mi, kaj kiun vi prenis, ne demandinte miajn sentojn, mi pretendas, ke mi ne havas la devon sklave submeti min al viaj deziroj; kaj mi volas

---

48 Tiele do vi plenumas la ŝuldiĝon de la ĵuro — France «C'est ainsi que vous satisfaites aux engagements de la foi». Anstataŭ «ŝuldiĝo» oni nun dirus «devigo»; sed sufiĉus diri pli simple: «Tiel do vi plenumas la (sanktan) promeson...».

49 ... nur ili geedziĝis al vi.

ĝui, mia sinjoro, la kelkan nombron da belaj tagoj, kiun donas al mi mia juneco, preni al mi la dolĉan liberecon, kiun la aĝo al mi permesas, vidi iom la belan societeton, kaj gustumi la plezuron aŭdi dolĉajn vortojn, kiujn oni diras al mi. Prepariĝu al tio, ke ĝi estu via puno, kaj danku la ĉielon, ke mi ne estas kapabla por io pli malbona.

**Georgo Dandin.** — Jes, tiel vi prenas la aferon! Sed mi estas via edzo kaj mi diras al vi, ke mi tion ne volas.

**Angeliko.** — Kaj mi, mi estas via edzino, kaj mi diras al vi, ke mi tiel volas.

**Georgo Dandin** *al si mem.* Mi havas grandan deziron fari kompton<sup>50</sup> el ŝia tuta vizaĝo kaj meti ŝin en tian stanton, ke ŝi plu neniam en sia vivo plaĉu al la dirantoj de flataĵoj. Iru, Georgo, Dandin; mi ne povus min deteni, kaj estas pli bone forlasi la lokon.

---

<sup>50</sup> *Kompoto* en la franca frazeologio povas respondi al la esperanta *kaĉo*. Eble Zamenhofo ne rekonis tian frazeologian uzon, aŭ eble li ankoraŭ ne decidis pri la esperanta idiomaĵo (la «Proverbaro» aperis pli malfrue, en 1910). Ĉiel ajn, en la «Rabistoj», eldonitaj samjare kun «Georgo Dandin», aperas (p. 70) la proksimsenca kaj pli moderna *kaĉo*: «Al mi donu la plezuregon, ke mi faru el li kaĉon!».

## Sceno kvina

*Angeliko, Klaŭdino.*

**Klaŭdino.** — Kun malpacienco mi atendis, sinjorino, ke li foriru, por ke mi transdonu al vi ĉi tiujn liniojn de tiu, pri kiu vi scias.

**Angeliko.** — Ni vidu.

**Klaŭdino** *al si mem.* — Kiom mi povas rimarki, tio, kion oni skribas al ŝi, ne tre malplaĉas al ŝi.

**Angeliko.** — Ha, Klaŭdino, kiel ĝentile ĉio estas esprimita en tiu ĉi bileto! Kian agrablan manieron la korteguloj havas en ĉiuj siaj paroloj kaj en ĉiuj siaj agoj! Kaj kio estas, en komparo kun ili, niaj provinculoj?

**Klaŭdino.** — Mi pensas, ke, post kiam vi vidis tiujn, la Dandinoj<sup>51</sup> ne povas plaĉi al vi.

**Angeliko.** — Restu ĉi tie, mi iros skribi la respondon.

**Klaŭdino** *sola.* — Ŝajnas al mi, ke mi ne bezonas rekomendi al ŝi, ke ŝi faru la respondon agrabla. Sed jen...

---

51 Ĉu oni voĉlegu /dandinoj/ aŭ /dandenoj/?

## Sceno sesa

*Klitandro, Lubin, Klaŭdino.*

**Klaŭdino.** — Vere, sinjoro, vi tie prenis al vi lertan komisiulon!

**Klitandro.** — Mi ne kuraĝis sendi iun el miaj homoj. Sed, mia bona Klaŭdino, mi devas ja rekompenci vin por la bonaj servoj, kiujn, kiel mi scias, vi faris al mi.

*Li serĉfosas en sia poŝo.*

**Klaŭdino.** — Ho, sinjoro, ne estas necese. Vi tute ne bezonas fari al vi tiun klopodon; mi faras al vi servojn, ĉar vi ĝin meritas, kaj mi sentas en mia koro inklinon por vi.

**Klitandro** *donante monon al Klaŭdino.* — Mi vin tre dankas.

**Lubin** *al Klaŭdino.* — Ĉar ni edziĝos, tial donu tion al mi, por ke mi ĝin konservu kune kun mia mono.

**Klaŭdino.** — Mi ĝin konservos por vi tiel same, kiel la kison.

**Klitandro** *al Klaŭdino.* — Diru al mi, ĉu vi transdonis mian bileton al via bela mastrino?

**Klaŭdino.** — Jes; ŝi jam skribas respondon al vi.

**Klitandro.** — Sed, Klaŭdino, ĉu ne estas eble, ke mi povu persone paroli kun ŝi?

**Klaŭdino.** — Jes; venu kun mi, mi donos al vi la eblon paroli kun ŝi.

**Klitandro.** — Sed ĉu ŝi tion aprobos? kaj ĉu estas neniala risko?

**Klaŭdino.** — Ne, ne! Ŝia edzo ne estas en la loĝejo; kaj krom tio ne pri li ŝi devas plej multe zorgi: nur antaŭ siaj gepatroj ŝi devas sin gardi; kaj se nur pri ili estas zorgite<sup>52</sup>, ĉion ceteran oni ne bezonas timi.

**Klitandro.** — Mi lasas min al via gvidado.

**Lubin sola.** — Al la diablo! Jen saĝan edzinon mi havos! Ŝi havas spriton kiel kvar<sup>53</sup>.

---

52 *se nur pri ili estas zorgite* — La francaj *pourvu qu'ils soient prévenus* signifas ĉi tie: «se nur ili konservos sian favoran impreson» (pli laŭvorte: «favoran antaŭjuĝon»).

53 Zamenhofo laŭvorte tradukis la francan *elle a de l'esprit comme quatre* kaj probable ne konsciis, ke la *comme quatre* estas idiomaĵo (ĝi signifas «multe»); tial la repliko estas stumpa, kaj laŭvorta traduko postulas kompletigon: «Ŝi havas tiom da sprito, kiel kvar homoj kune», aŭ simile. — Cetere, *kvar* en la franca frazeologio signifas «granda nombro», samkiel «sep» en rusa. En la «Proverbaro» tiel rolas *dek*: «*Dek* fojojn mezuru, unu fojon detranĉu»; «*Deko* da pekoj — unu la puno»; «Malsaĝulo ŝtonon ĵetis, *dek* saĝuloj ĝin ne atingos»; «Se unu ne venis, *dek* ne atendas»; «Unu vido taŭgas pli ol *dek* aŭdoj» (ruse en ĉiuj ĉi tiuj proverboj aperas «sep»). Do, por fari frazaĵon endus ŝanĝi «kvar»on en «dek»on. Tamen mi preferus traduki la replikon pli flue, ekz-e «Ah, diable saĝan edzinon mi havos!»

## Sceno sepa

*Georgo Dandin, Lubin.*

**Georgo Dandin** *al si mem.* Jen, estas mia homo de antaŭe. Ho, se mi povus ĝin atingi, ke li atestu al la gepatroj tion, kion ili ne volas kredi!

**Lubin.** — Ha, jen vi estas, sinjoro babilulo, al kiu mi tiel forte rekomendis nenion paroli, kaj kiu ĝin tiel forte promesis al mi! Vi estas do babilisto, kaj vi tuj ĉion transdiras, kion oni diras al vi sekrete?

**Georgo Dandin.** — Mi?

**Lubin.** — Jes, vi ĉion raportis al la edzo, kaj vi estas la kaŭzo de tio, ke li faris bruegon. Mi ĝojas, ke mi nun scias, ke vi havas tian langon kaj tio min instruos, ke mi nenion plu diru al vi.

**Georgo Dandin.** — Aŭskultu, mia amiko...

**Lubin.** — Se vi ne estus babilinta, mi rakontus al vi, kio fariĝas en la nuna momento; sed pro puno vi nenion scios.

**Georgo Dandin.** — Kio? kio do fariĝas?

**Lubin.** — Nenio, nenio. Jen kio estas, se oni babilis; vi ne sciiĝos eĉ unu vorton, kaj pri la plej interesa parto mi silentos.



**Georgo Dandin.** — Haltu do iom.

**Lubin.** — Neniĉel.

**Georgo Dandin.** — Mi volas diri al vi nur unu vorton.

**Lubin.** — Ho ne, ho ne! Vi volas eltiri de mi la sekreton.

**Georgo Dandin.** — Ne, ne tion.

**Lubin.** — He, vi pensas, ke mi estas malsaĝa! Mi vidas, kion vi celas.

**Georgo Dandin.** — Estas io tute alia. Aŭskultu.

**Lubin.** — Vi nenion atingos. Vi, volus ke mi diru al vi, ke sinjoro la vicgrafo donis monon al Klaŭdino, kaj ke ŝi kondukis lin al sia mastrino. Sed mi ne estas tiel malsaĝa.

**Georgo Dandin.** — Mi vin petas!

**Lubin.** — Ne!

**Georgo Dandin.** — Mi donos al vi...

**Lubin.** — Mendu-atendu!

## Sceno oka

**Georgo Dandin** *sola*. — Kun ĉi tiu malsaĝulo mi ne povis plenumi la penson, kiun mi havis. Sed la nova sciigo, kiu elglitis el lia buŝo, povas fari al mi tian saman servon; kaj, se la amisto estas en mia domo, tio donos al mi la eblon montriĝi prava en la okuloj de la gepatroj kaj plene ilin konvinki pri la senhonteco de ilia filino. La malbono en la afero estas nur tio, ke mi ne scias kiel min aranĝi, ke mi tiru profiton el tiu sciigo. Se mi eniros en mian domon, mi forkurigos la sentaŝgulon; kaj kion ajn malhonorigan por mi mi povus vidi per miaj propraj okuloj, oni tute ne kredos miajn vortojn, kaj oni diros al mi, ke mi fantazias. Aliflanke, se mi venigos la bogepatrojn, ne havante la certecon, ke ni trovos en mia domo la amiston, estos tiel same, kaj mi refalos, en la malbonan staton de antaŭe. Eble mi povus senbrue esplori, ĉu li tie estas ankoraŭ? (*Rigardinte tra la truo de la seruro.*) Ha! ĉielo! Oni plu ne povas dubi, mi vidis lin tra la truo de la seruro. La sorto donas al mi la eblon konfuzi miajn homojn; kaj, por kroni la tutan aventuron, ĝi alvenigas en la ĝusta momento la juĝantojn, kiujn mi bezonis.

## Sceno naŭa

*S-ro de Sotenville, s-ino de Sotenville, Georgo Dandin.*

**Georgo Dandin.** — Nu, vi ne volis kredi al mi antaŭ, kaj via filino venkis; nun mi havas en la mano la eblecon vidigi al vi, kiel ŝi min aranĝas; kaj, dank' al Dio, mia malhonoro estas nun tiel klara, ke vi ne povos plu dubi pri ĝi.

**S-ro de Sotenville.** — Kiel, mia bofilo! vi ĉiam ankoraŭ ripetas tion saman?

**Georgo Dandin.** — Jes, ĉiam ankoraŭ; kaj neniam mi havis por tio tiom da kaŭzo, kiel nun.

**S-ino de Sotenville.** — Vi denove volas turni al ni la kapon!

**Georgo Dandin.** — Jes, sinjorino; kaj kun mia kapo oni agas pli malbone.

**S-ro de Sotenville.** — Ĉu vi neniam laciĝos tedi nin?

**Georgo Dandin.** — Ne, sed mi forte laciĝas esti moke trompata.

**S-ino de Sotenville.** — Ĉu vi neniam volas liberigi vin de viaj strangaj pensoj?

**Georgo Dandin.** — Ne, sinjorino sed mi tre dezirus liberigi min de edzino, kiu min malhonoras.

**S-ino de Sotenville.** — Granda Dio! nia bofilo, lernu paroli konvene.

**S-ro de Sotenville.** — Al la diablo! serĉu esprimojn malpli ofendajn.

**Georgo Dandin.** — Kiu perdas, tiu ne ridas.

**S-ino de Sotenville.** — Memoru, ke vi edziĝis kun<sup>54</sup> nobela fraŭlino.

**Georgo Dandin.** — Mi tion memoras sufiĉe, kaj mi ĉiam nur tro multe memoros tion.

**S-ro de Sotenville.** — Se vi tion memoras, tiam penu paroli pri ŝi kun pli da respekto.

**Georgo Dandin.** — Sed kial ŝi pli ĝuste ne penas agi kun mi pli honeste? Kio! ĉar ŝi estas nobelino, ŝi devas havi la liberecon fari al mi, kion ŝi volas, kaj mi ne devas kuraĝi eĉ diri vorteton?

**S-ro de Sotenville.** — Kio do fariĝis al vi, kaj kion vi povas diri? Ĉu vi ne vidis hodiaŭ matene, ke ŝi eĉ ne konis tiun, pri kiu vi parolis al mi?

**Georgo Dandin.** — Jes; sed kion vi diros, se mi nun vidigos al vi, ke la amisto estas kun ŝi?

**S-ino de Sotenville.** — Kun ŝi?

**Georgo Dandin.** — Jes, kun ŝi, kaj en mia domo.

**S-ro de Sotenville.** — En via domo?

---

54 edziĝis al nobela fraŭlino (same ankaŭ poste).

**Georgo Dandin.** — Jes, en mia propra domo.

**S-ino de Sotenville.** — Se ĝi estos tiel, ni estos por vi kontraŭ ŝi.

**S-ro de Sotenville.** — Jes, la honoro de nia familio estas por ni pli kara ol ĉio en la mondo; kaj se vi diras la veron, ni malkonfesos en ŝi nian sangon kaj ni forlasos ŝin al via kolero.

**Georgo Dandin.** — Vi bezonas nur sekvi min.

**S-ino de Sotenville.** — Gardu vin kontraŭ trompiĝo!

**S-ro de Sotenville.** — Ne faru kiel antaŭe.

**Georgo Dandin.** — Mia Dio! Vi tuj vidos. (*Li montras en direkto al Klitandro, kiu elvenas kun Angeliko.*) Nu, rigardu, ĉu mi mensogis?

## Sceno deka

*Angeliko, Klitandro, Klaŭdino; s-ro de Sotenville, s-ino de Sotenville kaj Georgo Dandin en la profundo de la scenejo.*

**Angeliko** *al Klitandro.* — Adiaŭ! mi timas, ke oni povos vin ĉi tie surprizi, kaj mi devas min gardi.

**Klitandro.** — Promesu do al mi, sinjorino, ke mi povos paroli kun vi ĉi tiun nokton.

**Angeliko.** — Mi penos pri tio.

**Georgo Dandin** *al gesinjoroj de Sotenville.* — Ni alproksimiĝu kviete de malantaŭe, kaj ni zorgu, ke oni nin ne vidu.

**Klaŭdino.** — Ha, sinjorino! ĉio estas perdita! Jen estas viaj gepatroj en akompano de via edzo.

**Klitandro.** — Ho, ĉielo!

**Angeliko** *mallaŭte al Klitandro kaj Klaŭdino.* — Tenu vin tute trankvile kaj lasu min agi. (*Laŭte al Klitandro.*) Kio! Vi kuraĝas ankoraŭ agi tiamaniere post la historio de antaŭe! kaj, tiamaniere vi kaŝas viajn sentojn! Oni diras al mi, ke vi enamiĝis en min, kaj ke vi havas la intencon admonakiri min; mi atestas al vi mian indignon, kaj mi klare esprimas al vi miajn pensojn en atesto de ĉiuj; vi laŭte

neas la aferon kaj donas al mi la vorton, ke vi havas nian penson ofendi min; kaj tamen en tiu sama tago vi havas la arogantecon veni al mi vizite, diri al mi, ke vi min amas, rakonti al mi centon da malsaĝaj historioj, por konvinki min respondi al viaj malkonvenaĵoj, kvazaŭ mi estus tia virino, kiu povas rompi la ĵuron de fideleco, kiun mi donis al edzo, kaj iam forkliniĝi de la virteco, kiun instruis al mi miaj gepatroj. Se mia patro tion sciis, li bone instruus al vi provi tiajn entreprenojn! Sed honesta virino ne amas skandalon, tial mi gardas min ion diri al li, (*farrinte signon al Klaŭdino, ke ŝi alportu bastonon*) kaj mi montros al vi, ke kvankam mi estas virino, mi havas sufiĉe da kuraĝo, por venĝi min mem por la ofendoj, kiujn oni faras al mi. Tio, kion vi faris, ne estas ago de nobelo, kaj tial mi traktos vin ankaŭ ne kiel nobelon.

*Angeliko prenas la bastonon kaj levas ĝin kontraŭ Klitandron, kiu forkliniĝas tiamaniere, ke la batoj falas sur Georgon Dandin.*

**Klitandro** kriante, kvazaŭ li estus frapita. — Aj! aj! aj!  
Kviete!

## Sceno dek unua

*S-ro de Sotenville, s-ino de Sotenville, Angeliko, Georgo Dandin, Klaŭdino.*

**Klaŭdino.** — Forte, sinjorino, batu bone!

**Angeliko** *ŝajnigante, ke ŝi parolas al Klitandro.* — Se vi ankoraŭ ion havas sur la koro, mi estas ĉi tie, por respondi al vi.

**Klaŭdino.** — Rimarku ĝin bone, kun kiu vi ludas.

**Angeliko** *ŝajnigante sin mirigita.* — Ha, mia patro, vi estas ĉi tie!

**S-ro de Sotenville.** — Jes, mia filino; kaj mi vidas, ke koncerne la saĝon kaj kuraĝon vi montras vin inda ido de la domo de Sotenville. Venu ĉi tien, alproksimiĝu, ke mi vin ĉirkaŭprenu!

**S-ino de Sotenville.** — Ankaŭ min ĉirkaŭprenu, mia filino. Ha, mi ploras de ĝojo, kaj mi rekonas mian sangon en la agoj, kiujn vi ĵus faris.

**S-ro de Sotenville.** — Mia bofilo, kiel ravita vi devas esti! kaj kiel plena de dolĉeco certe estas por vi ĉi tiu okazaĵo! Vi havis justan kaŭzon por maltrankviliĝi; sed viaj suspektoj montriĝas forpelitaj en la plej brilanta maniero.



**S-ino de Sotenville.** — Sendube, nia bofilo, kaj vi devus nun esti la plej feliĉa el ĉiuj viroj.

**Klaŭdino.** — Certe. Kia virino, kia virino! Vi estas tro feliĉa, ke vi ŝin posedas, kaj vi devus kisi la teron, kie ŝi paŝis.

**Georgo Dandin** *al si mem.* — Ha, perfidulino!

**S-ro de Sotenville.** — Kio ĝi estas, mia bofilo? Kial vi ne dankas iomete vian edzinon por la amo, kiun, kiel vi vidas, ŝi montras rilate vin?

**Angeliko.** — Ne, ne mia patro, ne estas necese; li ne-nion ŝuldas al mi por tio, kion li ĵus vidis; kaj ĉio, kion mi faras en tiu rilato, estas nur pro amo al mi mem.

**S-ro de Sotenville.** — Kien vi iras, mia filino?

**Angeliko.** — Mi foriras, mia patro, por ke mi ne estu devigata akcepti liajn komplimentojn.

**Klaŭdino** *al Georgo Dandin.* — Ŝi estas prava, ke ŝi koleras. Ŝi estas virino, kiu meritas esti adorata, kaj vi ŝin ne traktas, kiel vi devus.

**Georgo Dandin** *al si mem.* — Kanajlo!

## Sceno dek dua

*S-ro de Sotenville, s-ino Sotenville, Georgo Dandin.*

**S-ro de Sotenville.** — Ĝi estas malgranda resento de la historio de antaŭe, kaj ĝi pasos post iom da karesado, kiun vi faros al ŝi. Adiaŭ, mia bofilo; nun vi jam ne bezonas plu maltrankviliĝi. Iru, faru pacon inter vi kaj penu kvietigi ŝin per petado de pardono pro via flamiĝo.

**S-ino de Sotenville.** — Vi devas konsideri, ke ŝi estas junulino, edukita en virteco, kaj ŝi ne kutimis, ke oni ŝin suspektu pri ia malkonvena ago. Adiaŭ. Ĝi faras al mi tre grandan ĝojon, ke mi nun vidas, ke viaj malkomprenoj estas finitaj, kaj ke ŝia konduto devas esti por vi tiel agrablega.

## Sceno dek tria

**Georgo Dandin** *sola*. — Mi ne diras eĉ unu vorton, ĉar per parolado mi nenion gajnos. Neniam oni vidis tian malfeliĉan sorton, kiel mia. Jes, mi admiras mian malfeliĉon kaj la subtilan lertecon de mia kanajla edzino, kiu scias ĉiam montri sin prava<sup>55</sup> kaj min malprava. Ĉu estas eble, ke mi ĉiam estos venkita de ŝi kaj la ŝajno ĉiam estos kontraŭ mi kaj mi neniam sukcesos elmontri la kulpecon de mia senhontulino? Ho, ĉielo, helpu miajn intencojn kaj donu al mi la favoron, ke mi povu vidigi al la homoj, ke oni min senhonorigas!

---

<sup>55</sup> *montri sin prava* — Jen ankoraŭ unu ĝusta objekta predikativo (kp la noton [10]).

# Akto tria

## Sceno unua

*Klitandro, Lubin.*

**Klitandro.** — Estas jam profunda nokto, kaj mi timas, ke eble estos jam tro malfrue. Mi tute ne povas min orienti. Lubin?

**Lubin.** — Sinjoro?

**Klitandro.** — Ĉu per ĉi tie?

**Lubin.** — Mi pensas, ke jes. Al la diablo! Kia malsaĝa<sup>56</sup> nokto, ke ĝi estas tiel malluma!

**Klitandro.** — Certe ĝi estas malprava; sed, se de unu flanko ĝi malhelpas nin vidi, de la dua flanko ĝi malhelpas nin esti vidataj.

**Lubin.** — Vi estas prava; la nokto ne estas tiel malprava. Mi volus scii, vi, sinjoro, estas ja tiel instruita, kial en la nokto neniam estas tago?

**Klitandro.** — Ĝi estas granda demando, kaj tre malfacila. Vi estas scivola, Lubin?

---

<sup>56</sup> *malsaĝa* ĉi tie signifas simple «aĉa». La franca *sot* povas signifi «3° *Fâcheux, désagréable, ridicule, en parlant de choses*» (*Littré*). La vorto «malsaĝa» ĉi tiun signifon ne havas.

**Lubin.** — Jes. Se mi estus lerninta, mi esplorus aferojn, kiujn oni neniam esploris.

**Klitandro.** — Mi kredas. Vi havas la mienon de homo, kiu havas spiriton subtilan kaj penetrantan.

**Lubin.** — Tute vere. Ekzemple, mi komprenas la lingvon latinan, kvankam mi neniam ĝin lernis. Kiam mi antaŭ nelonge vidis sur iu granda pordo la surskribon «Collegium», mi tuj divenis, ke, tio signifas kolegion.

**Klitandro.** — Mireginde! Vi scias do legi, Lubin?

**Lubin.** — Jes, mi scias legi presitajn literojn; sed neniam mi sukcesis lernatingi legi skribitaĵon.

**Klitandro.** — Jen ni estas apud la domo. (*Frapinte la manplatojn.*) Tio estas la signalo, pri kiu mi interkonsentis kun Klaŭdino.

**Lubin.** — Vorton de honoro, ŝi estas knabino, kiu valoras monon, kaj mi ŝin amas per mia tuta koro.

**Klitandro.** — Ĝuste tial mi vin alkondukis kun mi, por ke vi pasigu kun ŝi la tempon babilante.

**Lubin.** — Sinjoro, mi estas al vi...

**Klitandro.** — Ts! mi aŭdas ian brueton.

## Sceno dua

*Angeliko, Klaŭdino, Klitandro, Lubin.*

**Angeliko.** — Klaŭdino?

**Klaŭdino.** — Nu?

**Angeliko.** — Lasu la pordon iom malfermita.

**Klaŭdino.** — Mi tion faris.

*Nokta sceno. La aktoroj serĉas sin reciproke en la mallumo.*

**Klitandro** *al Lubin.* — Ĝi estas ili. Ts!

**Angeliko.** — Ts!

**Lubin.** — Ts!

**Klaŭdino.** — Ts!

**Klitandro** *al Klaŭdino, kiun li prenas por Angeliko.* — Sinjorino!

**Angeliko** *al Lubin, kiun ŝi prenas por Klitandro.* — Kio?

**Lubin** *al Angeliko, kiun li prenas por Klaŭdino.* — Klaŭdino!

**Klaŭdino** *al Klitandro, kiun ŝi prenas por Lubin.* — Kio estas?

**Klitandro** *al Klaŭdino, pensante, ke li parolas al Angeliko.* — Ha, sinjorino, kiom mi ĝojas!

**Lubin** *al Angeliko, pensante, ke li parolas al Klaŭdino.* — Klaŭdino, mia bona Klaŭdino!

**Klaŭdino** *al Klitandro.* — Kviete, sinjoro!

**Angeliko** *al Lubin.* — Trankvile, Lubin!

**Klitandro.** — Ĉu ĝi estas vi, Klaŭdino?

**Klaŭdino.** — Jes.

**Lubin.** — Ĉu ĝi estas vi, sinjorino?

**Angeliko.** — Jes.

**Klaŭdino** *al Klitandro.* — Vi prenis unu por alia.

**Lubin** *al Angeliko.* — Honestan vorton, en la nokto oni nenion vidas.

**Angeliko.** — Ĉu ĝi ne estas vi, Klitandro?

**Klitandro.** — Jes, sinjorino.

**Angeliko.** — Mia edzo ronkas tute dece; kaj mi uzas tiun ĉi tempon, por esti kun vi.

**Klitandro.** — Ni serĉu ian lokon, por sidiĝi.

**Klaŭdino.** — Tre bona konsilo.

*Angeliko, Klitandro kaj Klaŭdino sidiĝas en la profunda parto de la scenejo.*

**Lubin** *serĉante Klaŭdininon.* — Klaŭdino, kie vi estas?

## Sceno tria

*Angeliko, Klitandro, kaj Klaŭdino, sidante en la profundo de la scenejo; Georgo Dandin duone senvestigita, Lubin.*

**Georgo Dandin** *al si mem.* — Mi aŭdis, ke mia edzino iras malsupren, tial mi rapide min vestis, por sekvi ŝin. Kien ŝi povis iri? Ĉu eble ŝi eliris?

**Lubin** *serĉante Klaŭdinon.* — Kie do vi estas, Klaŭdino? (*Prenante Georgon Dandin por Klaŭdino.*) Ha, jen vi estas! Vorton de honoro, via mastro estas bele aranĝita, kaj mi trovas tion tiel same gajiga, kiel la bastonbatoj de antaŭe, pri kiuj oni al mi rakontis. Via mastriro diras, ke li ronkas nun kiel mil diabloj; kaj li ne scias, ke sinjoro la vicgrafo kaj ŝi estas nun kune, dum li dormas. Mi volus scii, kion li nun songas. Ĝi estas treege ridinda. Sed kial do venis al li en la kapon esti ĵaluza pri sia edzino kaj voli, ke ŝi apartenu sole nur al li? Li estas arogantulo, kaj sinjoro la vicgrafo faras al li tro da honoro. Vi nenion diras, Klaŭdino! Venu, ni ilin sekvu, kaj donu al mi vian maneteton, ke mi ĝin kisu. Ha, kiel dolĉa ĝi estas! Ŝajnas al mi, kvazaŭ mi manĝas konfitaĵon. (*Al Georgo Dandin kiun li ĉiam ankoraŭ prenas por Klaŭdino, kaj kiu lin krude repuŝas.*) Al la diablo! kiel vi batas! Ĝi estas



ja maneteto iom tre kruda!

**Georgo Dandin.** — Kiu iras?

**Lubin.** — Neniu.

**Georgo Dandin.** — Li forkuras, informinte min pri la nova perfidaĵo de mia sentaŭgulino. Nu, estas necese, ke, ne perdante tempon, mi sendu alvoki ŝiajn gepatrojn, kaj ke ĉi tiu aventuro servu al mi por liberiĝi de ŝi. Hola! Colin! Colin!

## Sceno kvara

*Angeliko, Klitandro, Klaŭdino kaj Lubin, sidante en la profundo de la scenejo; Georgo Dandin, Colin.*

**Colin** tra la fenestro. — Sinjoro?

**Georgo Dandin.** — Nu, rapide ĉi tien!

**Colin** elsaltante tra la fenestro. — Jen mi estas. Pli rapide oni ne povas.

**Georgo Dandin.** — Vi estas ĉi tie?

**Colin.** — Jes, sinjoro.

*Dum Georgo Dandin iras serĉi Colinon sur la flanko, kie li aŭdis lian voĉon, Colin transiras sur la duan flankon kaj tie endormiĝas.*

**Georgo Dandin** *turnante sin al la flanko, kie li supozas la ĉeestadon de Colin.* Mallaŭte, parolu mallaŭte. Aŭskultu. Iru al miaj gebopatroj<sup>57</sup> kaj diru al ili, ke mi ilin petas tre insiste veni tuj ĉi tien. Ĉu vi aŭdas? He! Colin! Colin!

**Colin** *sur la dua flanko, revigliĝante.* — Sinjoro?

**Georgo Dandin.** — Kie, al la diablo, vi estas?

**Colin.** — Ĉi tie.

**Georgo Dandin.** — Malbenita sentaŭgulo, kien li foriĝis! (*Dum Georgo Dandin returniĝas al la flanko, kie li supozas, ke Colin restis, Colin, duone dormante, transiras al la dua flanko kaj tie endormiĝas.*) Mi diras al vi, ke vi iru tuj al miaj gebopatroj kaj diru, al ili, ke mi ilin petegas veni ĉi tien tuje. Ĉu vi min komprenas? Respondu! Colin! Colin!

**Colin** *sur la dua flanko, revigliĝante.* — Sinjoro?

**Georgo Dandin.** — Tiu ĉi pendindulo min frenezigos! Venu al mi. (*Ili renkontiĝas kaj ambaŭ falas.*) Ha, la kaŭnajlo! Li min kripligis! Kie do vi estas? Alproksimiĝu, ke

---

<sup>57</sup> *gebopatroj* — Laŭ la Fundamento (*Ekzercaro*, §39) la ĝusta vorto estas *bogepatroj*. Ĉi tiu fundamenta formo dufoje aperas ankaŭ en ĉi tiu verko (2:8, 3:4). PIV1 laŭfundamente notas (ĉe **bo-**): «Rim. La pref. **bo** antaŭiras al la pref. **ge**: *bogefratoj*.» Tamen PIV2 ial (kial?!) ŝajnas preferi «gebopatroj»n (en la artikolo **patr/ bogepatroj** estas difinita per pluisendo al *gebopatroj*). En la reala uzo la fundamenta formo estas klare preferata.

mi donu al vi bonan porcion da batoj. Ŝajnas al mi, ke li forkuras de mi.

**Colin.** — Kompreneble.

**Georgo Dandin.** — Ĉu vi venos?

**Colin.** — Tute ne.

**Georgo Dandin.** — Venu, mi diris al vi.

**Colin.** — Ne. Vi volas min bati.

**Georgo Dandin.** — Nu, bone, mi nenion faros al vi.

**Colin.** — Certe?

**Georgo Dandin.** — Jes. Venu. Bone! (*Tirante Colinon je la brako.*) Ĝi estas via feliĉo, ke mi vin bezonas. Iru rapide peti en mia nomo miajn bogepatrojn, ke ili venu ĉi tien plej baldaŭ kiel ili nur povas, kaj diru al ili, ke ĝi estas por afero ekstreme grava kaj, se ili farus ian malfacilaĵon kaŭze de la malfrua horo, ne ĉesu ilin urĝi<sup>58</sup> kaj bone komprenigi al ili, ke estas tre grave, ke ili venu, en kia ajn stato ili troviĝas. Nun vi min bone komprenas?

**Colin.** — Jes, sinjoro.

**Georgo Dandin.** — Iru rapide kaj tuj revenu. (*Pensante, ke li estas sola.*) Kaj mi reeniros en mian domon kaj atendos, ĝis ... Sed mi aŭdas iun. Ĉu ĝi ne estas mia edzino? Mi aŭskultu kaj mi profitu de la mallumo.

58 Pli ĝuste: «...nepre persvadu ilin kaj bone komprenigu al ili, ke...»

*Georgo Dandin stariĝas apud la pordo de sia domo.*

## Sceno kvina

*Angeliko, Klitandro, Klaŭdino, Lubin, Georgo Dandin.*

**Angeliko** *al Klitandro.* — Adiaŭ! Estas tempo disiri.

**Klitandro.** — Kio? tiel frue?

**Angeliko.** — Ni sufiĉe longe parolis kune.

**Klitandro.** — Ha, sinjorino! Ĉu mi povas paroli sufiĉe kun vi kaj trovi en tiom malmulte da tempo ĉiujn vortojn, kiujn mi bezonas? Mi bezonus tutajn tagojn, por bone esprimi al vi ĉion, kion mi sentas; kaj mi ne diris al vi ankorau eĉ la plej malgrandan parton de tio, kion mi havas por diri al vi.

**Angeliko.** — Ni aŭdos plue alian fojon.

**Klitandro.** — Ho ve! Per kia bato vi traboras al mi la animon, kiam vi parolas pri via foriro kaj en kiom da malĝojo vi nun min lasas!

**Angeliko.** — Ni trovos la eblon, por nin revidi.

**Klitandro.** — Jes; sed mi pensas pri tio, ke forlasante min, vi iras al edzo. Tiu ĉi penso min mortigas; kaj la privilegioj, kiujn havas la edzoj, estas teruraj por amanto, kiu vere amas.

**Angeliko.** — Ĉu vi estas tiel malforta, ke vi havas tian

maltrankvilecon? Kaj ĉu vi pensas, ke oni estas kapabla ami certajn edzojn? Oni ilin prenas, ĉar oni nenion povas fari kontraŭ tio, kaj ĉar oni dependas de siaj gepatroj, kiuj rigardas nur la havon; sed oni scias ankaŭ agi kun ili juste, kaj oni tute ne havas la intencon ŝati ilin pli alte, ol kiom ili meritas.

**Georgo Dandin** *al si mem.* — Jen niaj kanajlaj edzinoj!

**Klitandro.** — Ha, oni devas konfesi, ke tiu, kiun oni donis al vi, tre malmulte meritas la honoron, kiun li ricevis! kaj ĝi estas tre stranga afero, tiu kunigo, kiun oni faris inter tia persono, kiel vi, kaj tia viro, kiel li!

**Georgo Dandin** *al si mem.* — Malfeliĉaj edzoj! jen kiel oni vin traktas!

**Klitandro.** — Vi meritas tre certe tute alian destinon, kaj la ĉielo tute vin ne kreis, por esti edzino de kampulo.

**Georgo Dandin.** — Se la ĉielo volus, ke ŝi estu via! vi baldaŭ parolus alie. Mi eniru; mi havas sufiĉe da tio.

*Georgo Dandin enirinte, fermas la pordon de interne.*

## Sceno sesa

*Angeliko, Klitandro, Klaŭdino, Lubin.*

**Klaŭdino.** — Sinjorino, se vi havas ankoraŭ ion malbonan por diri pri via edzo, vi rapidu, ĉar estas jam malfrue.

**Klitandro.** — Ha! Klaŭdino, vi estas kruela!

**Angeliko** *al Klitandro.* — Ŝi estas prava. Ni disiĝu.

**Klitandro.** — Mi devas do decidigi, ĉar vi tiel volas. Sed almenaŭ mi vin petegas, bedaŭru min iom pri la malbonaj horoj, kiujn mi nun pasigos.

**Angeliko.** — Adiaŭ!

**Lubin.** — Kie vi estas, Klaŭdino? mi volas diri al vi bonan nokton.

**Klaŭdino.** — Iru, iru, mi akceptas ĝin de malproksime, kaj mi resendas al vi tion saman.

## Sceno sepa

*Angeliko, Klaŭdino.*

**Angeliko.** — Ni eniru senbrue.

**Klaŭdino.** — La pordo fermiĝis.

**Angeliko.** — Mi havas la ĉefan ŝlosilon.

**Klaŭdino.** — Malfermu do mallaŭte.

**Angeliko.** — Oni ŝlosis de interne; kaj mi ne scias, kion ni faros.

**Klaŭdino.** — Veku la serviston, kiu kuŝas ĉi tie.

**Angeliko.** — Colin! Colin! Colin!

## Sceno oka

*Georgo Dandin, Angeliko, Klaŭdino.*

**Georgo Dandin** *ĉe la fenestro.* — «Colin! Colin!» Ha, mi vin kaptas ĉi tie, sinjorino mia edzino! kaj vi faras ekskursojn, dum mi dormas! Mi tre ĝojas pri tio, kaj estas al mi agrable vidi vin ekstere en tia malfrua horo.

**Angeliko.** — Nu, kia granda malbono ĝi do estas, se oni prenas en la nokto iom da freŝa aero?

**Georgo Dandin.** — Jes, jes; bona horo, por preni freŝan aeron! ĝi estis pli ĝuste varmo, sinjorino friponino; kaj, ni scias la tutan intrigon de la rendezuo kaj de la sinjoreto. Ni aŭdis vian delikatan interparoladon kaj la belajn laŭdajn vortojn, kiujn vi diris pri mi unu al la alia. Sed mi konsoliĝas per tio, ke mi tuj estos venĝita, kaj ke viaj gepatroj konvinkiĝos nun pri la justeco de miaj plendoj kaj pri la malmoraleco de via konduto. Mi sendis peti ilin ĉi tien kaj baldaŭ ili estos ĉi tie.

**Angeliko** *al si mem.* — Ha, ĉielo!

**Klaŭdino.** — Sinjorino!

**Georgo Dandin.** — Jen estas frapo, sendube, kiun vi ne atendis. Nun mi triumfas; kaj mi havas, per kio malaltiĝi vian fierecon kaj detruiri viajn artifikaĵojn. Ĝis nun vi mo-



kis miajn akuzojn<sup>59</sup>, blindigis viajn gepatrojn kaj beligis viajn trompojn. Vane mi vidis, vane mi parolis, via lerteco ĉiam venkis mian rajtecon, kaj ĉiam vi trovis rimedon por esti prava; sed ĉi tiun fojon, dank' al Dio, la aferoj klariĝos kaj via senhonteco estos plene elmontrita.

**Angeliko.** — He, mi vin petas, lasu malfermi al mi la pordon<sup>60</sup>.

**Georgo Dandin.** — Ne, ne! Vi devas atendi la venon de tiuj, kiujn mi invitis, kaj mi volas, ke ili vin trovu ekstere en la nuna bela horo. Atendante ilian venon, penu, se vi volas, serĉi en via kapo ian novan artifikon, por eltiriĝi el ĉi tiu afero! penu elpensi ian rimedon, por prezenti en bela lumo, vian vagadon; trovi ian belan ruzajon, por elturniĝi kaj aperi senkulpa; ian verŝajnigan pretekston por via nokta migrado, ekzemple, ke vi iris helpi ian amikino en akuŝo.

<sup>59</sup> *vi mokis miajn akuzojn* — En la franca *vous avez joué mes accusations* la vorto *joué* havas la signifon de *dejoué*; do, nek «ludis», nek «mokis», sed «ridindigis, vanigis miajn akuzojn».

<sup>60</sup> *lasu malfermi* — Ordonu malfermi, malfermigu (france: *faites-moi ouvrir la porte*).

«La diferenco inter **igi** kaj **lasi** estas, ke **igi** signas volon, ordonon, efikan agon, dum **lasi** signas cedon, rezignacion, ne-kontraŭstaron. Kp: *mi lasos fari mesojn* (mi ne malpermesos tion) kaj: *mi igos fari mesojn* (mi pagos por ili). Tiun distingon Z. plurfoje preteratentis en siaj tradukoj el la germana lingvo, kiu ĝin ne konas, ekz.: (ark.) *vi lasis min voki* (= vi vokigis min). Sed tia uzo de **lasi** en la senco de **igi** restis neimitata arkaismo.» (PIV1, la artikolo «lasi»).

**Angeliko.** — Ne; mi ne intencas ion kaŝi antaŭ vi. Mi ne volas min defendi nek malkonfesi antaŭ vi la aferojn, ĉar vi ja ĉion scias.

**Georgo Dandin.** — Ĉar vi bone vidas, ke ĉiuj rimedoj estas fermitaj por vi, kaj ke en ĉi tiu afero vi ne povus elpensi tiajn senkulpigojn, kies malverecon mi ne povus elmontri.

**Angeliko.** — Jes, mi konfesas, ke mi estas malprava, kaj ke vi havas kaŭzon, por plendi. Sed mi vin petas, faru al mi la favoron, ne elmetu min nun al la kolero de miaj gepatroj, kaj lasu rapide malfermi al mi.

**Georgo Dandin.** — Mi tuj obeos.

**Angeliko.** — Ho, mia bona edzeto, mi vin petegas!

**Georgo Dandin.** — Ho, mia bona, edzeto! Mi estas nun via bona edzeto, ĉar vi sentas, ke vi estas kaptita. Mi tre ĝojas pri tio; neniam antaŭe venis al vi en la kapon diri al mi tiajn dolĉajn vortojn.

**Angeliko.** — Aŭdu, mi promesas al vi, ke mi neniam plu donos al vi kaŭzon por plendi, kaj ke mi...

**Georgo Dandin.** — Nenio helpos. Mi ne volas ellasi el la manoj ĉi tiun aventuron, kaj estas grave por mi, ke oni unu fojon ricevu fundan klarigon pri via konduto.

**Angeliko.** — Mi petegas, lasu min paroli kun vi. Mi petas de vi unu minuton da aŭskultado.

**Georgo Dandin.** — Nu, kio?

**Angeliko.** — Estas vero, ke mi pekis, mi ĝin konfesas al vi ankoraŭ unu fojon, kaj via kolero estas justa; la tempon, kiam vi dormis, mi uzis, por eliri, kaj tiu ĉi eliro estis rendezuo, kiun mi donis al la persono, pri kiu vi parolis. Tamen ĝi estas ja agoj, kiujn vi devas pardoni al mia aĝo, forlogiĝoj de juna persono, kiu ankoraŭ nenion vidis kaj nur ĵus eniras en la mondon; libereco, al kiu oni sin fordonas, pensante ĉe tio nenion malbonan, kaj kiu sendube en la fundo havas nenion...

**Georgo Dandin.** — Jes, vi tion diras, kaj ĝi apartenas al tiuj aferoj, kiuj bezonas, ke oni ilin pie kredu.

**Angeliko.** — Mi tute ne volas diri per tio, ke mi estas senkulpa antaŭ vi, kaj mi vin nur petas, ke vi forgesu ofendon, pri kiu mi el mia tuta koro petas vian pardonon, kaj ke vi antaŭliberigu min de tiu renkontiĝo kaj de la ĉagreno, kiun povus kaŭzi al mi la malagrablaj riproĉoj de miaj gepatroj. Se vi grandanime donos al mi la favoron, pri kiu mi vin petas, tiam tiu ĉi ŝuldiga faro, tiu ĉi boneco, kiun vi montros al mi, akiros min por vi plene; ĝi tuŝos profunde mian koron kaj naskos tie por vi tion, kion la tuta potenco de miaj gepatroj kaj la ligiloj de la edzeco ne povis tie atingi. Per unu vorto, ĝi estos la kaŭzo, ke mi rifuzos ĉiun amindumadon, kaj mi havos sindonecon nur

por vi. Jes, mi donas al vi mian vorton, ke vi havos en mi de nun la plej bonan edzinon en la mondo, kiu montros al vi tiom da amo, tiom da amo, ke vi estos tute kontenta.

**Georgo Dandin.** — Ha, krokodilo, kiu flatas la homojn, por ilin sufoki!

**Angeliko.** — Donu al mi tiun favoron.

**Georgo Dandin.** — Nenio estos. Mi estas nepetegebla.

**Angeliko.** — Montru vin grandanima.

**Georgo Dandin.** — Ne.

**Angeliko.** — Kompatu min!

**Georgo Dandin.** — Tute ne.

**Angeliko.** — Mi vin petegas per mia tuta koro.

**Georgo Dandin.** — Ne, ne, ne! Mi volas, ke oni ĉesu erari pri vi kaj via konfuzo estu videbla por ĉiuj.

**Angeliko.** — Nu, bone! Se vi elmetas min al la malespero, mi vin avertas, ke virino en tia stato estas kapabla je ĉio, kaj mi faros ion, pri kio vi pentos.

**Georgo Dandin.** — Kaj kion vi faros, mia sinjorino?

**Angeliko.** — Mia koro min pelos al la plej ekstremaj decidoj; kaj per ĉi tiu tranĉilo, kiun vi vidas, mi tuj min mortigos.

**Georgo Dandin.** — Ha, ha! Perfekte!

**Angeliko.** — Por vi ĝi ne estos tiel perfekta, kiel vi pensas. Ĉiuj scias pri nia malpaco kaj la konstantajn

ĉagrenojn, kiujn vi faras al mi. Kiam oni trovos min mortigita, neniu dubos pri tio, ke min mortigis ĝuste vi; kaj miaj gepatroj certe ne lasos tiun morton nepunita, kaj ili venigos sur vian personon ĉian punon, kiun povos liveri al ili la decidoj de la juĝo kaj la ardeco de iliaj sentoj. Tiamaniere mi trovos rimedon, por venĝi min kontraŭ vi; kaj mi ne estas la unua, kiu uzas tiamanieran venĝon kaj kiu ne timas eĉ sin mortigi, por pereigi tiujn, kiuj estas tiel kruelaj, ke ili nin puŝas al la ekstreco.

**Georgo Dandin.** — Mi estas via obeema servanto<sup>62</sup>. Oni nun jam ne pensas plu pri mortigado de si mem; la modo pri tio pasis jam de longe.

**Angeliko.** — Ĝi estas afero, pri kiu vi povas esti tute certa; kaj se vi persistos en via rifuzo, se vi ne lasos malfermi al mi, mi ĵuras al vi, ke tuj mi vidigos al vi, ĝis kie povas iri la decidemeco de persono, kiun oni elmetas al malespero.

**Georgo Dandin.** — Vantaĵo, vantaĵo! Tio tute ne faras al mi ian timon.

**Angeliko.** — Nu, bone! Ĉar ĝi estas necesa, jen kio

---

<sup>62</sup> *Mi estas via obeema servanto* — La franca idiomaĵo *Je suis votre valet* esprimas ironian malkonsenton. Pli frue (2:4) ĝi jam aperis en la teksto, kaj tie Zamenhofo ĝin taŭge tradukis per la antifrazo «Mi vin tre dankas por tio». Ankaŭ ĉi-okaze ĝin endus anstataŭigi per io pli klara kaj situacie konvena (ekz-e per «Babilaĵo!»).

kontentigos nin ambaŭ kaj montros, ĉu mi ŝercas. (*Fa-  
rinte kvazaŭ ŝi sin mortigas.*) Ha, ĝi fariĝis! La ĉielo do-  
nu, ke mia morto estu venĝita tiel, kiel mi deziras, kaj ke  
tiu, kiu estas la kaŭzo de tio, ricevu justan punon por lia  
krueleco kontraŭ mi!

**Georgo Dandin.** — Oho! Ĉu ŝi efektive estus tiel mal-  
bona kaj mortigus sin, por ke oni min pendigu? Ni prenu  
peceton da kandelo, por rigardi.

## Sceno naŭa

*Angeliko, Klaŭdino.*

**Angeliko al Klaŭdino.** — Ts! silente! Ni tuj stariĝu ĉe  
la ambaŭ flankoj de la pordo.

## Sceno deka

*Angeliko kaj Klaŭdino enirante en la domon en la momento, kiam Georgo Dandin el ĝi eliras, kaj ŝlosante la pordon de interne; Georgo Dandin tenante kandelon en la mano.*

**Georgo Dandin.** — Ĉu la malboneco de virino efektive povas atingi tian gradon? (*Sola, rigardinte ĉien ĉirkaŭe.*) Neniu estas! Ha, mi tion suspektis; la pendindulino foriris vidante ke ŝi nenion atingos de mi, nek per pe-toj, nek per minacoj. Des pli bone! tio faros ŝiajn aferojn ankoraŭ pli malbonaj; kaj la gepatroj, kiuj baldaŭ venos, vidos per tio ŝian krimon ankoraŭ pli bone. (*Tuŝinte la pordon de sia domo por eniri.*) Ha, ha! la pordo ŝlosiĝis! Hola! tie! Iu venu! Oni tuj malfermu al mi!

## Sceno dek unua

*Angeliko kaj Klaŭdino ĉe la fenestro; Georgo Dandin.*

**Angeliko.** — Kio! ĝi estas vi! De kie vi venas, sentaŭgulo? Ĉu nun estas tempo, por reveni hejmen, kiam preskaŭ jam tagiĝas? Tia estas la konduto de honesta edzo?

**Klaŭdino.** — Ĉu estas bele drinki la tutan nokton kaj lasi tiamaniere en la daŭro de tuta nokto malfeliĉan junan edzinon en la domo?

**Georgo Dandin.** — Kio! vi ...

**Angeliko.** — Iru, iru, perfidulo, mi estas laca de via malĉasteco, kaj mi plendos, ne atendente plu, al miaj gepatroj.

**Georgo Dandin.** — Kio! Vi ankoraŭ kuraĝas ....



## Sceno dek dua

*S-ro de Sotenville kaj s-ino de Sotenville en noktaj vestoj; Colin, portante lanternon; Angeliko kaj Klaŭdino ĉe la fenestro; Georgo Dandin.*

**Angeliko** *al gesinjoroj de Sotenville.* — Ho, venu, mi vin petegas, venu doni al mi venĝon por la plej granda aroganteco de la flanko de edzo, al kiu la vino kaj ĵaluzecco, en tia grado konfuzis la cerbon, ke li plu scias nek kion li diras, nek kion li faras, kaj kiu mem sendis inviti vin, ke vi estu atestantoj de la plej granda sensencaĵo, pri kiu oni iam aŭdis. Jen li revenas, kiel vi vidas, lasinte atendi sin la tutan nokton; kaj se vi volos lin aŭskulti, li diros al vi, ke li havas kontraŭ mi la plej grandajn plendojn; ke dum li dormis, mi forŝteliĝis de li, por iri vagi, kaj cent aliajn samspecajn historiojn, kiujn li songis.

**Georgo Dandin** *al si mem.* — Ha, kia malica kanajlo!

**Klaŭdino.** — Jes, li volis kredigi al ni, ke li estis en la domo kaj ni estis ekstere; kaj ĉi tiun frenezaĵon oni ne povas elpeli al li el la kapo.

**S-ro de Sotenville.** — Kio! Kion tio signifas?

**S-ino de Sotenville.** — Kia furioza senhonteco, sendi voki nin!

**Georgo Dandin.** — Neniam ...

**Angeliko.** — Ne, mia patro, mi ne povas plu toleri tiaspecan edzon; mia pacienco estas tute elĉerpita; kaj ĵus li diris al mi centon da plej ofendaj vortoj.

**S-ro de Sotenville** *al Georgo Dandin.* — Al la diablo! vi estas malnobla homo!

**Klaŭdino.** — Estas terure, kiam oni vidas, ke malfeliĉan junan virinon oni traktas en tia maniero, kaj tio krias pri venĝo al la ĉielo.

**Georgo Dandin.** — Ĉu oni povas...

**S-ro de Sotenville.** — Iru, vi devus morti de honto.

**Georgo Dandin.** — Lasu min diri al vi du vortojn.

**Angeliko.** — Vi nur aŭskultu, li rakontos al vi belajn historiojn.

**Georgo Dandin** *al si mem.* — Mi enfalas en malesperon.

**Klaŭdino.** — Li tiom multe drinkis, ke oni ne povas longe stari apud li; la vinaodoro, kiun li elspiras, atingas ĝis ni.

**Georgo Dandin.** — Sinjoro bopatro, mi vin petegas...

**S-ro de Sotenville.** — Forŝoviĝu; vi malbonodoras vinon per via tuta buŝo.

**Georgo Dandin.** — Sinjorino, mi vin petas...

**S-ino de Sotenville.** — Fi, ne alproksimiĝu al mi, via

spirado estas pesta.

**Georgo Dandin** *al s-ino de Sotenville.* — Toleru, ke mi...

**S-ro de Sotenville.** — Foriĝu, mi diras al vi; oni ne povas toleri vin.

**Georgo Dandin** *al s-ro de Sotenville.* — Mi petegas vin, permesu, ke...

**S-ino de Sotenville.** — Hu, vi min svenigas. Parolu de malproksime, se vi volas.

**Georgo Dandin.** — Nu, bone! Jes, mi parolos de malproksime. Mi ĵuras al vi, ke mi eĉ ne moviĝis el mia domo, sed nur ŝi eliris.

**Angeliko.** — Ĉu ne estas tiel, kiel mi diris al vi?

**Klaŭdino.** — Vi vidas, kian verŝajnecon ĝi havas.

**S-ro de Sotenville** *al Georgo Dandin.* — Iru, vi mokas la homojn. Venu ĉi tien malsupren, mia filino.

## Sceno dek tria

*S-ro de Sotenville, s-ino de Sotenville, Georgo Dandin, Colin.*

**Georgo Dandin.** — Mi atestigas la ĉielon ke mi estis en la domo kaj...

**S-ro de Sotenville.** — Silentu! ĝi estas netolerebla sensencaĵo.

**Georgo Dandin.** — La tondro min tuj mortigu, se...

**S-ro de Sotenville.** — Ne turnu al ni plu la kapon, sed penu peti pardonon de via edzino.

**Georgo Dandin.** — Mi! peti pardonon?

**S-ro de Sotenville.** — Jes, pardonon, kaj tuj!

**Georgo Dandin.** — Kio! mi...

**S-ro de Sotenville.** — Al la diablo! Se vi kontraŭparolos al mi, mi vin instruos, kio estas moki nin.

**Georgo Dandin.** — Ha, Georgo Dandin!

## Sceno dek kvara

*S-ro de Sotenville, s-ino de Sotenville, Angeliko, Georgo Dandin, Klaŭdino, Colin.*

**S-ro de Sotenville.** — Venu ĉi tien, mia filino, por ke via edzo petu de vi pardonon.

**Angeliko.** — Mi! pardoni al li ĉion, kion li diris al mi? Ne, mia patro, mi neniel povas decidiĝi al tio; kaj mi petas vin disigi min de edzo, kun kiu mi plu ne povus vivi.

**Klaŭdino.** — Kiel oni povus ĉion elporti!

**S-ro de Sotenville.** — Mia filino, tiaj disiĝoj ne povas esti farataj sen granda skandalo; kaj vi devas montri vin pli saĝa ol li kaj pacienci ankoraŭ ĉi tiun fojon.

**Angeliko.** — Kiel! pacienci post tiaj indignindaĵoj! Ne, mia patro, tian aferon mi ne povas konsenti.

**S-ro de Sotenville.** — Estas necese, mia filino, kaj mi tion al vi ordonas.

**Angeliko.** — Ĉi tiu vorto fermas al mi la buŝon, kaj vi havas super mi senliman potencon.

**Klaŭdino.** — Kia bonkoreco!

**Angeliko.** — Estas ĉagrene, se oni estas devigata forgesi tiajn ofendojn; sed kian ajn perforton mi devas fari al mi, mi devas vin obei.

**Klaŭdino.** — Malfeliĉa ŝafeto!

**S-ro de Sotenville** *al Angeliko.* — Alproksimiĝu!

**Angeliko.** — Ĉio, kion vi devigas min fari, servos al nenio; kaj vi vidos, ke morgaŭ ĉio denove rekomenciĝos.

**S-ro de Sotenville.** — Ni faros ordon. (*Al Georgo Dandin.*) Venu, genuiĝu!

**Georgo Dandin.** — Genuiĝi?

**S-ro de Sotenville.** — Jes, genuiĝu, kaj tuj!

**Georgo Dandin** *genuiĝante, kun kandelo en la mano; al si mem.* — Ho, ĉielo! (*Al s-ro de Sotenville.*) Kion mi devas diri?

**S-ro de Sotenville.** — «Sinjorino, mi petas vin pardoni al mi ...»

**Georgo Dandin.** — «Sinjorino, mi petas vin pardoni al mi ...»

**S-ro de Sotenville.** — «La sensencaĵon, kiun mi faris ...»

**Georgo Dandin.** — «La sensencaĵon, kiun mi faris ...» (*al si mem*) edziĝante kun vi.

**S-ro de Sotenville.** — «Kaj mi promesas al vi pli bone konduki en la estonteco.»

**Georgo Dandin.** — «Kaj mi promesas al vi pli bone konduki en la estonteco.»

**S-ro de Sotenville** *al Georgo Dandin.* — Gardu vin,

kaj sciu, ke ĝi estas la lasta el la arogantaĵoj, kiun mi toleras.

**S-ino de Sotenville.** — Per Dio! se vi ankoraŭ unu fojon permesos al vi<sup>63</sup>, oni instruos al vi la respekton, kiun vi ŝuldas al via edzino kaj al tiuj, de kiuj ŝi devenas.

**S-ro de Sotenville.** — Jen jam tagiĝas. Adiaŭ! (*Al Georgo Dandin.*) Iru en vian domon kaj penu esti bonkondukta. (*Al s-ino de Sotenville.*) Kaj ni, mia koro, ni iru enlitiĝi.

## Sceno dek kvina

**Georgo Dandin, sola.** — Ha, mi nun rezignacias, ĉar mi vidas plu nenian rimedon. Kiam oni, simile al mi, edziĝis kun malbona virino, tiam la plej bona, kion oni povas fari, estas iri ĵeti sin en la akvon, la kapon antaŭen.

# FINO

---

63 Mankas objekto («permesos al vi *ion tian*» aŭ simile). France: *si vous y retournez* (= se vi revenos al tio, se vi ripetos tion).